

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

6

1998

ISSN 0032 - 4361

**Ĉinaj tekstilaj industrioj progresos
post retiriĝo**

Ĉinoj kaj Interreto

Montpeliero gastigos la 83-an UK



Ruino en Yuanmingyuan-ĝardeno

Foto de WANG TIANXING

INTER NI

Mi legas ĉiujn artikolojn en EPĈ, tamen mi deziras ankaŭ tiujn pri altteknologio. En la januara numero mi legis pri ĉina roboto, sed laŭ mia opinio ĝi estis malgrase priskribita.

MIODROG RISTIC (Jugoslavio)

Kun granda intereso mi legis en la februara eldono de via belega informa gazeto la artikolojn "Pri reformado de kuracaj pagoj" kaj "Bazaj rajtoj de ĉinaj laboruloj". Mi ne atendis, ke vi tiel rapide povas plenumi mian deziron pri la asekura sistemo en via lando.

Mi tutkore komprenas la necesecon reformi la kuracajn pagojn kiam la kostoj senbridaj plialtiĝas.

GERRIT BRONS (Nederlando)

Min interesas plej multe artikoloj pri konstruado. Do mi esperas, ke vi daŭrigos skribon pri la granda kaj grava konstruado de San Xia (Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero). Tiu granda konstruaĵo influos la tutan mondon,

ekzemple pri transportoj kaj prezo de kupro.

LEIF HOLMLUND (Svedio)

Antaŭ nelonge mi donacis preskaŭ tutan mian E-bibliotekon al la biblioteko de la Fremdlingva Fakultato en Ĉelabinska Ŝtata Pedagogia Universitato. Ankaŭ ĉiun duan numeron de EPĈ tien mi redonas.

Bedaŭrinde, mi ne povas aperigi tradukaĵojn el via revuo, kiel mi konstante faris. Mi tamen havas invitojn kunlabori en noveldonotaj gazetoj kaj esperas denove ion traduki el via revuo.

**VJAĈESLAV ROJDEST
VENSKIJ** (Rusio)

Mi havas ekzemplerojn de kelkaj verkoj de Konfuceo, tradukitajn en la anglan. Mi legis ilin malfacile pro neklara traduko. La Esperanta traduko de "Analektoj" superegas pro tre facile komprenebla lingvo kaj interesa antaŭparolo. **JOHN ABOOD** (Aŭstralio)

El Popola Ĉinio

6 | 477 | 1998



Gajaj infanoj

Foto de Zhao Xi

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Hou Zhiping

Adreso: P. O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio


Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/elpopolacxinio>>

ENHANO

- 2 **INTER NI**
- 4 Malpezigi ŝarĝon de la lernantoj
- 6 **EKONOMIE:**
Ĉinaj tekstilaj industrioj progresos post retiriĝo; Denove vigliĝas Wangfujing; Kurantaj aferoj
- 8 **ĈINAJ E-ISTOJ:**
Kontentiĝemulo
- 10 **ORIGINALE VERKITAJ:**
La suno sonĝas
- 11 **SUR NIA LIBROBRETO:**
Pri "Analektoj de Konfuceo";
Pri "Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof"
- 12 **POR KOMENCANTOJ:**
Esperanto kaj familia amo
- 13 **ESP-NOVAĴOJ**
- 14 **JUNULARO:**
Modo de amuzoj kaj konsumo
- 16 Knabina Esperanto-horo
- 17 "La Blua Birdo" en Ĉinio
- 20 Montpeliero gastigos la 83-an UK
- 21 **NUNTEMPA BELARTO:**
Kampano-artisto kaj liaj argilaj metiartaĵoj
- 24 Tri fabloj
- 25 **HOMARO KAJ NATURO:**
Nordorientaj tigroj revenos en la naturon
- 28 **LAŬ LA SILKA VOJO:**
Produktejo de jado
- 36 **MULTNACIA ĈINIO:**
Hujoj hieraŭ kaj hodiaŭ
- 38 Eksterlandano lernas ĉinan humuran dialogon
- 40 Nerenkontita amiko
- 42 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**
Ĉinoj kaj Interreto
- 44 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 46 Dazhai hodiaŭ
- 48 Atesto pri ĉina prahistorio
- 50 Li ne bedaŭras
- 51 **ĈINAJ POŝTMARKOJ:**
Pudong
- 2 Ruino en Yuanmingyuan-gardeno
- SUR LA DORSKOVRILO:**
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Lago ĉe Yinchuan; Fagaro en Olet



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

1. Ningxia (p. 36)
2. Ŝanhajo (p. 6)
3. Interna Mongolio (p. 48)
4. Guangdong (p. 8)
5. Guilin (p. 16)

Malpezigi ŝarĝon de la lernantoj

EN la aĝo de 6 jaroj Wenwen ekvizitis lernejon, forlasinte siajn pupojn kaj ludilon urseto. Ŝi iris al la lernejo kun peza sako plena de lernolibroj kaj kajeroj. Sur la revena vojo, anstataŭ ŝi ŝiaj geavoj portas la sakon. Tamen la geavoj ne povas helpi ŝin en ĉio — ŝi havas multe da hejmtaskoj, kiuj lacigas ŝiajn manojn; dimanĉe ŝi devas viziti progresigan kurson. La tro laca knabineto plendas al sia patrino: “Mi deziras fariĝi kateto kaj dormi tuttage.”

En la ĉinaj lernejoj, ne nur Wenwen, sed ankaŭ aliaj lernantoj havas pezan sakon. Ili estas solinfanoj, sur kiujn la gepatroj metas grandan esperon. Ili deziras, ke la infanoj akiru altajn poentojn en ekzameno, eniru bonajn mezlernejojn kaj studu en universitato. Tiel la lernantoj antaŭ gravaj ekzamenoj sentas fortan krizon. Por ke ili sukcesu en la ekzamenoj, la lernejoj devigas ilin fari multege da ekzercoj kaj ofte ekzamenas ilin. La ekzameno kun pli da demandoj fariĝis pli kaj pli malfacila. Ĉiutage la lernantoj en konstanta streĉiteco devas lerni dekelkajn horojn.

La ĉina sistemo de enira ekzameno por altaj lernejoj inspiris la lernantojn diligente studi kaj multaj el ili fariĝis kapablaj faku-

loj. Sed iom post iom oni rimarkis, ke la instruistoj kaj lernantoj strebas sole al sukceso en ekzameno, kion oni nomas “edukado por ekzameno”, kiu pezigas la taskon kaj animstaton de la lernantoj. Pro ekzameno oni malstreĉis kulturadon pri kvalito de la lernantoj. Nobel-premiito pri scienco prof. Chen-ning Yang diris, ke la ĉinaj studentoj akiris altajn poentojn en aliaj landoj. En universitataj ekzamenoj, ili ofte renkontis demandojn, kiujn ili konis jam en mezlernejo, tamen alilandaj studentoj neniam kontaktis. Tamen la ĉinaj studentoj ne kuraĝas fari, eĉ pripensi tion, kion instruistoj ne menciis. En la 21-a jarcento, pro la pli streĉa konkurenco en la socio oni devas kapabli memlerni kaj krei, ne nur havi sciojn, sed ankaŭ apliki ilin, kaj kompreneble ili devas havi fortan vivipovon en la socio. Jam en la 50-aj jaroj, la ĉina eduka politiko celis kulture kapablulojn bonkonduktajn, klerajn kaj sanajn. Poste la eduka politiko celis kulture disciplinajn kapablulojn kun alta idealo, moraleco kaj klereco. Sed tiuj politikoj ne estis bone praktikitaj en instruado. De la 80-aj jaroj, komenciĝis la reformado anstataŭigi edukadon por ekzameno per edukado por multflankaj kvalitoj.

La reformado unue okazis en eduka maniero. Por kulture kapablojn de la lernantoj, oni devas ŝanĝi la manieron, ke instruisto donas lecionon kaj lernantoj aŭskultas. Iuj lernejoj provis “plezurigan edukadon” kaj atingis bonajn rezultojn. Ekz. dum leciono de fonetiko, por ke la geknaboj bone memoru la literon “a”, instruisto petis knabinon stari profile sur podio kaj turnis la atenton de la geknaboj al ŝia kapo. “Rigardu, ronda kapo kun eta harplektaĵo, ĉu tio ne similas al la litero a?” La lernantoj ekridis. “Do, kiaj estas la literoj n, m, h, l...?” La lernantoj aktive respondis. Naskiĝis alfabeto kanto: pordo — n, pordo-paro — m, h estas seĝeto... La lernantoj kaj laŭtleĝas kaj gestas. En amuza ludo ili lernas multe kaj neniom sentas lacon. Pli gravas, ke ĝi vigligas ilian imagon, kiu estas ĝermo de kreivo.

En la edukado por multflankaj kvalitoj multaj instruistoj komprenis, ke por malpezigi ŝarĝon de la lernantoj, unue oni devas kulture ilian kapablon. Ekz. verkado povas montri homajn kapablojn. Iuj lernantoj ne povas fini la taskon de verkado en difinita tempo kaj devas fari ĝin ankaŭ en libera tempo. Por levi iliajn kapablojn tiurilatajn, krom la du

lernohoroj en ĉiu semajno, la lernejo donas lecionon ankaŭ pri libera legado. La lernantoj notas brilajn esprimojn kaj frazojn, poemojn kaj fabelojn, kiuj plaĉas al ili. Dum tia leciono la lernantoj tute libere asimilas nutron el la literatura mondo. Ili faris tre belajn notojn kun koloraj ilustraĵoj. Poste ili “eldonis” gazetojn manskribitajn — mem verki, redakti, aranĝi paĝojn... La lernantoj verkis post vizito de muzeoj kaj zoo. Ĉar iliaj multflankaj kapabloj estis bone kulturitaj, tial multaj lernantoj kapablas finverki en 40 minutoj taŭgan artikolon por difinita temo.

Cirkulas popoldiro en la lernejoj: “Poentoj estas vivo de la lernantoj,” ĉar la instruistoj kaj gepatroj taksas la lernantojn laŭ iliaj poentoj. En la gravaj ekzamenoj, poentoj decidas la sorton kaj estontecon de la ekzamenoj, ĉar foje la lernanto ne povis eniri bonan lernejon pro diferenco de nur 0.5 poento. Iu elementlernejo akiris 99 poentojn en aritmetika ekzameno, tamen li estis la 31-a, ĉar 30 lernantoj antaŭ li akiris ĉiu 100 aŭ 99.5 poentojn. La knabo sentis malesperon. Strange, alta poento kondukis al malespero. En Ŝanhajo kaj Ŝandong, iuj lernejoj provas “klerigadon sen poento” por tiri la atenton de lernantoj el la poentoj. En iuj lernejoj ekfunkcias socio-modelo, en kiu la lernantoj funkciiĝas bankojn kaj vendejojn, preparas manĝaĵojn... En liberaj horoj aktivigas diversaj grupoj, en kiuj la lernantoj prezentas rakontojn, pentras, ludas pilkon kaj ŝakon, verkas poemojn... Kaj la instruistoj taksas ilin ne plu laŭ poentaro, sed diras jenajn vortojn: “Vi, knabino kvieta kaj silentema, ĉiam zorgas pri la klaso, vi purigis la ŝrankon, riparitis la viŝilon de nigra tabulo... Mi tre ŝatas vin. Mi bedaŭras, ke via manskribo ne estas tre bela. Tamen mi kredas,



Pezaj librosakoj

ke post ekzercado vi bele skribos.” Aŭ: “Vi estas saĝa kaj pezo... Mi esperas, ke en lernado vi havos bonan atingon same kiel vi gajnis ĉampionecon en 100-metra sprinto.” Leginte tion, la lernanto sentas, ke la instruisto estas afabla kiel amiko kaj intima kiel patrino. Iu lernanto diris: “Antaŭe mi timis, ke en la taksado la instruisto montras mian petolaĵon, kaj nun mi deziras laŭtleĝe ĝin al miaj gepatroj, al multaj aliaj.”

En la nuna Ĉinio, ne ĉiuj gimnazianoj post sia diplomitiĝo povas daŭrigi sian studon en altaj lernejoj, tamen neniu devas esti kribrita, ĉar ankaŭ tiuj, kiuj malsukcesis en ekzameno, havas sian kapablon. Ĉiu propran saĝon posedas. Tial, ekde septembro de 1997, la Ŝtata Eduka Komisiono de Ĉinio efektivas edukadon por multflankaj kvalitoj en la tuta lando

kaj faras reformojn: simpligi la lernobjektojn de elementkaj mezlernejoj, malaltigi la postulon pri edukado, faciligi la ekzamenojn, pri iuj lecionoj la lernantoj ne plu submetiĝas al ekzameno. La celo estas malpezigi ŝarĝon de la lernantoj, por ke ili havu tempon iri en la naturon kaj socion, fari sporton kaj fizikan laboron. Oni forigis la titolon “elitaj mezlernejoj”. La geknaboj diplomitiĝintaj el elementlernejoj eniros proksiman mezlernejon sen ekzameno. Tiel lernantoj ne plu devas strebi por altaj poentoj. Poentaro de lernantoj ne plu estas unika kriterio por taksati la instruistojn kaj lernejojn.

Krom reformado en elementkaj mezlernejoj, Ĉinio ankaŭ disvolvas altlernejojn, ekz. kolegiojn kaj altlernejojn por plenkreskuloj, por kontentigi ĉiujn, kiuj deziras lerni en altlernejoj. ■

Ĉinaj tekstilaj industrioj progresos post retiriĝo

de JI PING

TUJ post la Novjaro de 1998 komenciĝis reduktado de spindeloj en tekstilaj fabrikoj de Ŝanhajo kaj Tianjin (Tjanĝin). Iliaj teksistoj malmuntis maŝinojn produktitajn en la 20-30-aj jaroj. La teksistinoj tre bedaŭris tion, tamen ili sciis, ke tio estas necesa por liberigi la entreprenojn el la malfacila situacio.

Por kio tion fari? Ĉinaj ekonomikistoj montris, ke tio estas rimedo alprenita konforme al la aktuala situacio de la tekstilaj industrioj de Ĉinio por ilia progreso en la estonteco.

La tekstilaj industrioj rapide disvolviĝis en Ĉinio, kiam la ĉinoj estis malfacilaj en vestado. Dank' al la disvolviĝo, decembre de 1993 la ĉina registaro abolis la porciumon de ŝtofoj, praktikatan 19 jarojn.

Jam en 1990 la ŝtataj tekstilaj entreprenoj de Ĉinio havis 5.56 milionojn da laboristoj kaj 40 milionojn da spindeloj, kies produktopovo multe superis la bezonon de la merkato. Tiam, laŭ plano, oni malpliigis dek milionojn da spindeloj, sed la rezulto ne estis kontentiga. Malgrandaj entreprenoj aĉetis la spindelojn, kiujn jam ne plu uzis la grandaj. En 1996 plena deficito atakis la ŝtatajn tekstilajn entreprenojn. Kaj sub tiu cirkonstancaro reformo de ĉinaj tekstilaj industrioj fariĝis nepre necesa.

La ĉina registaro decidis en tri jaroj malpliigi dek milionojn da spindeloj kaj 1.2 milionojn da laboristoj, por ke en 2000 la deficito estu anstataŭita de profito.

Ĉar la tekstilaj entreprenoj de Ĉinio havas multe da problemoj, se oni bone solvos ilin, tio helpos reformadon de aliaj entreprenoj de Ĉinio.

La reformado komenciĝis unue de Pekino, Tianjin kaj Ŝanhajo kaj estis efektivigita ĉefe per aranĝado de fiksa kapitalo de entrepreno. Samtempe kun tio, multaj entreprenoj disvolvas siajn produktaĵojn kun famaj markoj kaj fabrikoj altvalorajn varojn por partopreni en la konkurenco en la merkato en- kaj eksterlanda. Du kotonteksaj fabrikoj de Ŝanhajo rapide elliberigis sin el deficito per rearanĝado de fiksa kapitalo kaj pli racia dispozicio de produktaj faktoroj. Unu jaron antaŭe, multaj ŝtataj tekstilaj entreprenoj de Ŝanhajo malpliigis entute 280 mil laboristojn kaj la totala produktovalorero de 1997 egalas al tiu de 1996, kun totala interezo de 300 milionoj da juanoj (unu usona dolaro = 8.2 juanoj). ■



Malnovaj spindeloj ne plu uzataj

Denove vigliĝas Wangfujing

de JIN JIE

DENOVE vigliĝas la komerca kvartalo Wangfujing (Ŭangfuĝing) post ekfunkciado de la Nova Dong'an-bazaro en januaro ĉi-jare.

Wangfujing, kiel komerca kvartalo en Pekino, famas pro siaj longhistoriaj firmaoj, kiaj Quanjude (Ĉjüanĝjude)-Restoracio de Rostitaj Anasoj, Tongrentang-apoteko de Ĉinaj Medikamentoj kaj Shengxifu-butiko de Ĉapoj. Ankaŭ la malnova Dong'an-magazeno, plurfoje rekonstruita, havis multe da butikoj de ĉiutagaj bezonaĵoj. Kontraŭ ĝi sidas la Granda Pekina Ĉiovendejo, alia magazeno de la kvartalo.

Antaŭ tri jaroj komenciĝis rekonstruado de Dong'an-bazaro. Kun tradiciaj trajtoj ekstere kaj tipa moderneco interne, la nova bazaro areis

220 mil kvadratajn metrojn, 30-oble kiom la malnova. En la suda parto vendiĝas popularaj varoj kaj en la norda, sub administrado de francaj komercistoj, liveriĝas ĉefe multekostaj varoj. Ambaŭflanke de la koridoro, per kiu interkomuniĝas la suda kaj norda partoj, funkcias butikoj de vestoj kun diversaj markoj. Kaj krome, en ĝi estas ankaŭ ok kinejoj kaj etendiĝas strato, apud kiu lokiĝas butikoj kun longa historio.

Kadre de Pekino, la Nova Dong'an-bazaro estas forta en la konkurenco koncerne la skalon kaj

modernecon. Tamen, kiam ĝi estis konstruata, iuj novaj magazenoj ĉesis funkcii nelonge post sia inaŭguriĝo pro forta konkurenco. Nun en la urbo funkcias dekoj da magazenoj kaj ankaŭ diversaj staplejoj-vendejoj kaj ĉen-butikoj, kiuj akre konkurencas. Tial, koncernaj entreprenistoj kaj ekonomikistoj multe atentigas, kian sorton havos la Nova Dong'an-bazaro kaj kion ĝi alportos al la komerca kvartalo sub tiu cirkonstancaro.

Multaj klientoj vizitis la bazaron en la unua tago post ĝia ekfunkcio kaj en la sama tago ankaŭ la Granda Pekina Ĉiovendejo atingis la plej altan rekordon de vendosumo, kompare kun tiu en la pasintaj jaroj. Respondeculo de iu alia magazeno opiniis tion kaj ŝanco kaj defio, ĉar la Nova



En la Nova Dong'an-bazaro

Dong'an-bazaro altiris al si multajn klientojn de aliaj komercaj kvartaloj. Dank' al tio, prosperiĝis ankaŭ aliaj magazenoj de Wangfujing kaj pliakriĝis la konkurenco inter tieaj magazenoj. Antaŭ la defio multaj magazenoj penadas por sin stabiligi per aparta entreprenado. Iuj el ili vendas ĉefe meblojn kun slogano Por Krei Belan Vivon, aliaj servas per varoj en pariza aŭ eŭropa modo kaj triaj laŭeble plibeligas siajn vendejojn. Mastro de butiko de ledaj varoj diris: "Ni neniam vendos malbonkvalitajn varojn, alie ni ne havos lokon en la kvartalo." ■

KURANTAJ AFEROJ

● En 1997 la nacia ekonomio de Ĉinio iris kun alta kresko kaj malalta inflacio. Kaj la enlanda produktovaloro atingis 7 477.2 miliardojn da juanoj, 8.8% pli multe ol tiu de 1996.

1 En 1997 la nombro de alilandaj turistoj en Ĉinio estis 57.588 milionoj, 12.64% pli multe ol tiu de 1996. La valuta enspezo tiurilata atingis 12.074 miliardojn da usonaj dolaroj, 18.37% pli multe ol tiu de 1996, kaj tiuflanke Ĉinio okupis la 8-an lokon en la mondo anstataŭ la 9-a en 1996.

● Ĝis la fino de 1997, Ĉinio arbarizis areon de 20 milionoj da hektaroj en siaj nordokcidenta, nordorienta kaj norda partoj. Dank' al tio unuapaŝe bremsitaj estis 20% de la dezertigita tero en la regiono atakata de sablovento kaj 40% de la eroziita tero, kaj 65% de la kulturataj kampoj estis protektataj per forsto-reto.

● Antaŭ nelonge en Ĉinio naskiĝis kvin transgenaj kapridoj kun integra geno de homa koagula faktoro IX. Unu el ili donas lakton kun aktiva proteino de homa koagula faktoro IX. Laŭ kalkulo, unu kaprino tiuspeca donas tiom da supre menciita proteino jare, kiom tiu en la jara totala kvanto da sango donacita de ŝanhajanoj.

Tio estas grava paŝo por produkti altvalorajn medikamentojn el besta lakto por la homaro.

Kontentiĝemulo

de WANG JIANBING

EN la aĝo de 74 jaroj Ye Shuzi aspektas ne maljuna. Li, kun lumaj vangoj kaj iom grizaj haroj, marŝas forte kiel mezaĝulo. Pro tio s-ro Ye fieras. Eble neniu dubas, ke li aspektas 64-jara.

Parolante pri sanprotekto, li resumis kiel la jenon: ĝojemo, kontentiĝemo kaj helpemo.

En la juneco li ne estis sana. En 1943 li finis lernadon en mezlernejo. Por studi en universitato, kune kun siaj tri junaj kunuloj li veturis unu monaton per aŭto kaj ŝipo al Chongqing, tiam provizora ĉefurbo de Ĉinio. 1943 koincidis kun la posta periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito de la ĉina popolo, ĉie regis ĥaoso. Survoje li malsaniĝis je malario kaj fariĝis malforta. Rememorante la pasintaĵon li multe dankis tiujn esperantistojn, kiuj helpis lin en la vivo kaj lernado.

En Hengyang, kie Ye malsaniĝis, vivis lia koresponda amiko Ĝolabio. Ye ripozis en lia hejmo. Ĝolabio kaj lia patrino donis al li multe da helpo. Post unu semajno Ye resaniĝis. De tiam lia amo al Esperanto pli profundiĝis.

Post la enira ekzameno por universitato en Chongqing, li povis kontakti la Chongqing-an Esperantan Korespondan Lernejon. Kiam li estis mez-

lernejo, li lernis nian lingvon en la koresponda lernejo kaj konatiĝis kun sia unua E-instruisto Honfan. Honfan estis serioza instruisto, Ye Shuzi lernis Esperanton tri jarojn en korespondado kaj tiutempe Honfan korektis lian ekzercaron skrupule. En la urbo Ye Shuzi kun granda ĝojo intervidiĝis kun Honfan, kaj ĉi tiu prezentis lin al s-ano Zen Hojaŭ. Inluite de Zen kaj aliaj amikoj, Ye Shuzi komencis lerni en la kemi-industria fakultato de Zhejiang-universitato. En ĝi li konatiĝis kun d-ro Kenn Wong, pioniro de la Ĉina Esperanto-movado kaj instruisto pri la franca lingvo. Tiam Ye ne havis

tempon studi Esperanton. Sed Esperanto multe helpis lin studi la germanan lingvon en la universitato, ankaŭ la rusan lingvon poste.

En 1949 Ye diplomiĝis el la universitato kaj eklaboris en milita entrepreno de norda Ĉinio. Tio ne estis oportuna por li kontakti diversajn personojn, inkl. de esperantistoj.

Ye estas intelektulo kun forta memestimo, iam li malĝojis pro bagatelo. Sed la vivo ŝanĝis lian karakteron, precipe hardado en malfavoraj cirkonstancoj donis al li deteniĝemon.

Li ne monavidis, sed diligente laboris. Post kelkdekjara

Ye Shuzi (dekstre) kaj Honfan en 1986



laboro li fariĝis specialisto pri kemia industrio. En 1977 li estis elektita kiel reprezentanto de la Popola Kongreso de Guangdong-provinco. En 1983 li estis elektita kiel reprezentanto de la 6-a Tutlanda Popola Kongreso. Eble iuj opiniis, ke li estas brila en politiko. Sed fakte, li estas ordinara kaj apartenas al neniu partio. Li ŝatas vivi kiel ordinarulo.

Ye estas unu el la fondintoj de la Guangdong-a Esperanto-Asocio. En 1980 li kaj aliaj samideanoj preparis sin por fondi la asocion. En 1981 li kune kun aliaj okazigis Esperantan kurson.

Nun Ye kaj liaj amikoj kune funkciigas kompanion kaj ĉiujare ili subvencias la Guangdong-an Esperanto-Asocion. Li esperas, ke lia tekniko fariĝos produkto favora al la socio kaj Guangdong-a Esperanto-movado.

Li opinias sin feliĉa. Kiam li estis en malfacila situacio, liaj samideanoj helpis lin. Nun li estas feliĉa, liaj gefiloj kaj genepoj multe zorgas pri li. Antaŭ nelonge, li aĉetis komputilon por la kompanio kaj preparis sin por lerni ĝin manipuli. ■



Ye Shuzi (la tria de dekstre) en la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto en Kunming en 1985



Ye Shuzi kaj liaj familianoj



Ye Shuzi (la tria de maldekstre) en Finnlando

La suno sonĝas

de LAŬLUM



Laŭlum (la dua de dekstre) kaj alilandaj esperantistoj

En la tria numero de 1995 ni publikigis pecojn el “222 Simplaj Versaĵoj por Komencantoj” verkita de Laŭlum, kio vekis ŝaton de niaj legantoj. Por kontentigi la interesatojn, ni aperigis pliajn kiel jene.*

La Red.

DANCU! DANCU!

*Dancu! Dancu!
Svingu l' krurojn,
lulbalancu
la plezurojn!*

*Vin turnadu kiel turbo!
Sido, staro estas kulpo!*

*Dancu pando,
dancu nano,
dancu manto,
dancu rano!*

*Kantu arde! Dancu arte!
Dancu salte kaj senhalte!*

NOBLA HOMO

*La bela vorto “Homo”
ja estas nobla nomo.
Fiulo malbonema*

egalas al demono.

*Por esti homo vera,
restadu vi sincera,
helpema, simpatia,
afabla, nefiera.*

MALVARMUMO

*Malvarmumo
estas puno
al malzorgo
pri kostumo.*

*Iuj strebas
nur al belo,
sed neglektas
pri vetero.*

*Pli ol ĉarmo
gravas varmo.
Spitu ne al
frost-alarmo!*

LA SUNO SONĜAS

*La suno sonĝas pri la luno;
la luno sonĝas pri la suno.
la suno kaj la lun' diskutas
Pri la printempo kaj aŭtuno.*

*“Printempo estas la plej bona,
printempe floras ĉiuj floroj.”
“Aŭtuno estas la plej bona,
aŭtune fruktas la laboroj!”*

*Jen ĝardenisto intervenas:
“Ja ili ambaŭ valorplenas.
Printempo florojn al ni
aŭtune fruktojn ni rikoltas.”*

* Ĝi estis eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en 1995. 7,50 USD.

Pri “Analektoj de Konfuceo”

de **JOHN ABOOD** (Aŭstralio)

Analektoj de Konfuceo. El la ĉina trad. Wang Chongfang. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1996. 114 p. 21x15cm. Bind. Prezo: 14.00 USD Sendokosto: 3.00 USD

Analektoj de Konfuceo estas kolekto de eldiroj kaj anekdotoj de Konfuceo kaj liaj disĉiploj.

La libro havas 20 ĉapitrojn; ĉiu ĉapitro havas nombron da sekcioj kaj ĉiu sekcio havas unu aŭ pli da paroletoj aŭ anekdotoj. Ĝi temas pri politiko, filozofio, eduko, etiko, principoj de morala konduto, literaturo, artoj, ktp.

Ĉi tiu eldono enhavas antaŭparolon, kiu skizas la vivon de Konfuceo kaj la historion de liaj familio kaj prapatroj. La antaŭparolo ankaŭ resumas la influon de Konfuceo en la ĉina historio. Ĝi inkluzivas citaĵojn, kiuj ilustras la ĉefajn temojn de la instruoj kaj pensoj de Konfuceo ekz.:

Ne faru al aliaj tion, kion vi ne deziras fari al vi mem.


Regu per la forto de sia virto.

Mi havas ekzemplerojn de kelkaj verkoj de Konfuceo, tradukitajn en la anglan. Mi legis ilin malfacile pro neklara traduko. La Esperanta traduko de “Analektoj” superegas pro tre facile komprenebla lingvo kaj interesa antaŭparolo.

Pri “Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof”

Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof. Kompilita de Kawanisi Teturo kaj Mine Yositaka. Japana Esperanta Kooperativo, 1997. A5 - 147 p. 15 gld.

En 1997 la Japana Esperanta Librokooperativo (la eldona fako de Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj) eldonis nove kompostitan libron “Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof” kun utilaj glosoj kaj klarigoj.



La libro kolektas paroladojn de Zamenhof faritajn en la unuaj 8 universalaj kongresoj kaj en la urbodomo de Londono en 1907. Ĉiuj vortoj de liaj paroladoj estas impresaj kaj kortuŝaj, li sincere kaj trafe alvokis al animoj de tiamaj esperantistoj la plej gravajn temojn de tiu tempo: Esperantismo, Interna ideo, Esenco kaj celo de la kongreso, Reforma problemo kaj patriotismo, Esenco kaj estonteco de Esperanto, Organiza problemo ktp. En la parto Suplemento oni povas legi leteron, deklaron kaj paroladon de Zamenhof pri la naskiĝo de Esperanto, la esenco de Esperantismo kaj aliaj. Preskaŭ ĉiuj temoj estas ankoraŭ valoraj, freŝaj kaj aktualaj.

La malnova versio de tiu ĉi libro, kiun prizorgis la bedaŭrata s-ro Miyamoto Masao en 1963 (3-a eldono en 1973), estis fakte ofseta represaĵo de la eldono de la Kaniĵa Librejo en Kioto en 1924. Por tiu ĉi eldono kun afabla permeso de “Ludovikito”, s-ro Ito Kanzi, ni rekompostis la tuton laŭ “Plena Verkaro de L.L. Zamenhof” (PVZ). Ni tamen korektis kelkajn vortojn, konsultante la alian apenaŭ konatan “Paroladoj de D-ro L.L. Zamenhof”, kiun kompilis kun detalaj komentoj la japanaj erudiciaj zamenhofologoj Sasaki Tasuku kaj Iwasita Zyuntaro en 1932 (la reviziita eldono).

Vi ricevos rabatojn mendante tri ekzemplojn aŭ pli ĉe la Japana Esperanta Librokooperativo (eldona fako de KLEG), Toyonakasi-si, Sone-higasi 1-11-46-204, 561 Japanio, tel/faks: +81 (0) 6841 1928

Esperanto kaj familia amo

de HENRI DETOC (Francio)

MI nomiĝas Henri Detoc. Mi loĝas en Francio. Mi ne havis infanon. Mia vivo finiĝus sen celo, sen ĝojo, en mia 67-jara aĝo. Subite mi eklernis Esperanton. Tuj post ricevo de atesto mi petis de la Koresponda Servo Mondskala (KSM) korespondanton en Ĉinio. Tiam komenciĝis tiu rakonto. KSM donis al mi junan virinon Wang Ai. Aperis antaŭ mi tiu problemo: Kiel povus dece rilati maljuna viro al juna virino? Sed feliĉe, Budao prizorgis tiujn du estaĵojn. Per sia saĝeco li donacis al ili la Esperantan parencecon. Miraklo!

Fakte, ni rakontis pri nia malmilda infana vivo, kaj tuj poste ni rimarkis en ni tute similajn pensojn pri ĉio... poezio, muziko, arto... eĉ ankaŭ kuirarto! Do, iom post iom, inter du simplaj gekorespondantoj aperis amikeco kaj, sekve, natura reciproka amo. Unuafoje en mia vivo, mia maljuna koro ekbatis de la filina amo, kaj mia tenera filino skribis: Mia karega paĉjo, vi kunportas al mi la patran amon, kiu tiom mankis al mi... Mia vivo estas plene sunumita. Mi decidis viziti mian karegan filinon. Ĉar mi ne estas riĉa, mi ŝparis monon. Mi ekflugis post du jaroj, septembron de 1997.

En Ĉinio du aliajn korespondantojn mi havas. En Guilin estas Lu Jixin, fama poeto, kiu donis al mi la gastamon. Tiu bonkora viro vizitigis al mi sian belegan

urbon kaj la mirindan ĉirkaŭaĵon... lagoj, rivero, kavernoj kaj ĉefe tiujn strangaj montpintoj. Ĉie mi vidis la urbon en plena disvolviĝo, la laboreman popolon. Infanoj venis alparoli min, eĉ beboj mansignis kaj ridetis al mi... Ankaŭ, malgraŭ mia aĝo, mi alte taksas la ĉarmon de aziaj virinoj... Mia korespondanto Li Xian estas fora... Finfine, la 26-an de septembro, kun emociigo mi brakumis mian teneran filinon. Mi trapasis paradizan restadon kun miaj du filinoj (ĉar Wang Ai havas fratinon)! Ili dorlotis min, ilian maljunan paĉjon, kiu iomete fore loĝas. Mia vivo eltrovis celon kaj sunon. Mi revenis hejmen. Mi ploris de ĝojo. ■



La aŭtoro (meze) kaj Wang Ai (maldekstre) en la Somera Palaco

ĈINIO

● La 14-an de februaro en la Metiarta Lernejo de Jinan (Ĝjnan), Shandong-provinco, la Jinan-a Esperanto-Asocio okazigis ceremonion por pendigi la ŝildon, kaj dekoj da esperantistoj partoprenis ĝin. Post la fondiĝo en 1986 la asocio energie diskonigis Esperanton. La ĉi-foja aktivado favoros la lokan Esperanto-movadon. (Zhang Shuhua)

VJETNAMIO

● La 2-a Azia Kongreso de Esperanto okazos en 1999, en Hanojo, Vjetnamio. Invitite de LKK, Takeuti Yosikazu, prezidanto de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM), kaj Puramo Chong, sekretario de KAEM, vizitis Hanojon en novembro 1997. Ili diskutis kun membroj de LKK pri ĉiuj gravaj problemoj koncerne la preparadon de la venonta kongreso. Ili decidis, ke la kongreso okazos je du semajno post la UK en Berlino kun la temo: Kunlaboro por Paco, Stabilo kaj Disvolvo. Vespere de la 28-a de nov. okazis en la Hanoja Televida Stacio bonveniga kunsido far Vjetnama Esperanto-Asocio kaj Hanoja Esperanto-Asocio por la delegacio de KAEM. Takeuti kaj Puramo estis intervjuitaj de televida raportisto, la ĵurnalo de Hanojo raportis la viziton. Poste Takeuti vizitis la urbon Ho Chi Minh kaj ĉeestis kurson de Esperanto por komencantoj. (Esperanto en Azio)

KROATIO

● La 5-a Mara Internacia Renkontiĝo de Keja okazos de la 21-a ĝis la 25-a de julio 1998 en Savudrija, Kroatio. Ĝi estas la unika ebleco por vi veni al Savudrija kaj kun amuzegaj homoj festi la jaron de oceano sendante bondezirojn pere de Adriatika Maro. Pliaj informoj riceveblas ĉe: Keja, Amruseva 5/1, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

DANIO

● La dana poŝto ankaŭ dum 1998 utiligos reklamstampilon sinsekve en diversaj poŝtcentroj. La teksto de la stampo signifas "Esperanto — interpopola lingvo" kaj estis kaj estos uzata tiel: 16.03 - 17.04 - Vestjyllands Postcenter; 11.05 - 19.06. - Nordjyllands Postcenter; 20.07 - 21.08. - Sydjyllands Postcenter; 21.09. - 23.10. - Fyns Postcenter. Mendon de la stampo eksterlandanoj povas sendi al: Esperanto Unuiĝo de N stved, Fyrrev nget 4, DK-4700 N stved, Danmark. Sendu prefere adresitan koverton kaj internacian respondkuponon aŭ ŝanĝeblan monbileton je valoro de po iom pli ol 1 DEM. (Esperanto Unuiĝo de N stved)

JUGOSLAVIO

● Semajno de Esperanto-Kulturo okazis en oktobro 1997, kiam estis 10-jariĝo de la strato Esperan-

to en Senta, kie partoprenantoj plantis la arbon de amikeco. Dum siaj E-agadoj en 1997, E-Societo Senta tre sukcese kolektis pli ol 300 subskribojn por la Praga Manifesto kaj tiamaniere kontribuis al la "Kampanjo 2000". (Sinisa Velickovic)



Ĉeestantoj de "Semajno de Esperanto-Kulturo"

● La 2-a Somera Esperanto Lernejo okazos de la 10-a ĝis la 18-a de julio en konata turisma loko Banja Vrucica apud Teslic. Bonvolu skribi al: ELSR aŭ s-ro Gradimir Kragic, ul. Svetog Save H-15, YU-74270 Teslic, Serba Respubliko. Rete: esperokg@pesha.bc.rstel.net.

La 3-a Esperantista Renkontiĝo de Serba Respubliko okazos de la 27-a ĝis la 30-a de aŭgusto en Prijedor. Bonvolu skribi al: ELSR aŭ s-ro Branko Vokic, Pecani H-1, YU-79000 Prijedor, Serba Respubliko. Rete: vvb@ets.org.yu. (ELSR)

RUSIO

● La Junulara Renkontiĝo "Vladivostokaj Esperanto-Tagoj" 98 okazos la 1-6-an de julio kadre de la urbaj naskiĝfestoj. Adreso: Esperanto-Klubo, Teknika Universitato, 10, Puskinskaja, 690600 Vladivostok, GSP, Rusio. Tel: (4232)268769; fax: (4232)261689. (Esperanto Klubo)

ITALIO

● Antaŭ ne longe inaŭguriĝis nova piedira subpasejo Esperanto, irebla precipe por ĉirkaŭ du mil gestudentoj, kiuj vizitas, ĉiutage, la altlernejan urbeton. (Giuseppe Trambaiolo)



Ĉe inaŭguro de la subpasejo Esperanto

Modo de amuzoj kaj konsumo

Nuntempe la ĉinaj junuloj estas pli kaj pli multe influataj de la universala furoro en manieroj amuza kaj konsumata. Junuloj en urboj havas oportunun apreci popkantojn aŭ filmojn alilandajn; kaj tiuj en kamparo ĝuas ĝojoplenajn amuzojn, kvankam ne tiel mode kiel urbanoj. Mia koleginino Xiang Hong havas ne alte salajratan, tamen relative stabilan postenon. Ŝi kaj ŝiaj geamikoj diplomiĝintaj el altlernejoj multe diferencas per la enspezo. Tiu ĉi artikolo iagrade spegulas la modon de amuzoj kaj konsumo de junaj urbanoj en Ĉinio.

Yu Tao

de XIANG HONG

JAŬDE, Xiaoling ĵus revenis Pekinon post intervjuo en alia urbo. Entaksiiĝinte ŝi per portebla telefono kontaktis Yichuan: “Trejnisto, ĉu vi estos libera en tiu ĉi semajnofino? Kiam ni ludos tenison?”

Yichuan ricevis la nomon “trejnisto” pro tio, ke li ludas tenison pli bone ol siaj amikoj. Li legis la agendon kaj telefonis respektive al Xiao Wang, Weixing kaj mi. Post tio li respondis al Xiaoling:

“De la dua ĝis la kvara posttagmeze tiun ĉi dimanĉon, ĉu bone? Jes, mi mendos la ludkampon. Ĝis!”

Tiamaniere ni aranĝis la semajnofinan renkontiĝon. Sub la cirkonstancoj de rapidiĝanta vivoritmo kaj intensiĝanta konkurenco, libera tempo fariĝas valora por ni junuloj. Kian amuzon elekti kaj kiel sin amuzi, tio dependas de diversaj kondiĉoj.

KIAN AMUZON ELEKTI

Ĝenerale, por unu regiono aŭ urbo, la amuza maniero kaj kvalito de ĝiaj loĝantoj dependas de iliaj financo kaj klereco. En julio de 1997, iu enketa kompanio nomata “Nul horo” faris priamuzan enketon inter 1 500 loĝantoj de Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj tri urboj. Laŭ nombro de elektantoj, la elektitaj amuzoj laŭvice estas filmo, televido, librolegado, surbendigita muziko, VCD, karaoke, radio, danco ktp. La enketo ankaŭ montras: Ju pli malaltan edukadon oni ricevis, des pli multe oni ŝatas sin amuzi per filmoj; ju pli oni junas, des pli multe oni ŝatas surbendigitan muzikon kaj VCD-on; ju pli altan edukadon oni ricevis, des pli multe oni ŝatas legi libron kaj spekti dramon, operon k.a.

Amuzoj kontentigas la be-

zonon de homoj en spirito, kaj sportoj ilian bezonon kaj en spirito kaj en korpo. Iu enketo montras, ke plejparto da junuloj partoprenas en popularaj sportoj, kiaj futbalo, korbopilko, tablotenis, volanludo, naĝo, biciklado kaj promenado; nur kvinono da junuloj ofte partoprenas en la multekostaj sportoj, kiaj teniso, golfo, bovingo, gimnastado kaj korbobeliga gimnastiko. La lastajn sportojn faras ĝenerale dungitoj en establoj de alilandaj entreprenistoj en Ĉinio kaj entreprenoj kune investitaj de Ĉinio kaj alia lando, altrangaj administrantoj en ŝtataj entreprenoj aŭ oficejoj kaj liberprofesiuloj, kies monata enspezo superas 2 mil juanojn.

Mi prenas min mem kaj miajn amikojn kiel ekzemplon. Mia monata enspezo estas ĉ. mil juanoj, kaj kun tiom da enspezo vivas ĉ. kvarono da junuloj; Xiaoling,


menciita supre, estas televida raportistino, ŝia monata enspezo superas 3 mil juanojn; liberprofesulo Jutao kaj lia raportistino-edzino Xiaopei jam aĉetis apartamenton kaj aŭton. En Ĉinio la prezo de unu meze luksa aŭto egalas al mia dekjara enspezo. Tiukaze, mi povas nur malofte spekti bleton aŭ provi multekostan bovlignon, kiu ĵus ekfuroris en Ĉinio. Por Jutao kaj Xiaopei estas ne malfacile vojaĝi eksterlanden. Por ni la komunaj amuzoj kompreneble estas multaj: tutnokta spektaklo de filmoj en semajnofino, karaokado, ekskurso, montgrimado, naĝo, ludo de teniso kaj volano ktp. Ni pagas laŭ AA-sistemo.

KIEL KONSUMI

La konsumata trajto de junuloj estas ĉasi modon. Kiam aperis disko-danco, ili iris por sperti ĝisŝvitan saltadon sub surdiga pezmetala muziko; la bufedejo "Malmola Ŝtono" ekloĝis en Pekino, kaj multaj junuloj estas sorĉitaj de la romantikeco produktita de kampara muziko aŭ ĵazo; junuloj konsistigas la ĉefan merkaton de popmuziko; nuntempe, ili intencas partopreni en "tendumo por kampa vivo" kaj la riskoplena *Bungy*-ludo. En tiu ĉi Printempa Festo, iu el miaj amikinoj donacis al mi botelon da har-koloriga ŝprucaĵo. Nur tiam mi ekkonsciis, ke en stratoj tiuj kapoj kun ruĝbruna aŭ helflava haroj estas produktaĵoj de tia ŝprucaĵo.

Vestoj kaj kosmetikaĵoj kun fama marko forte allogas la ĉinajn junulojn. Fakte la tuta ĉina konsumata merkato, iom snobema, iom vantama, restas ankoraŭ nematura. La konsumantoj aĉetas varojn pli belaspektajn ol bonkvalitajn. Tamen mi kredas, ke tio nur estas trairebla procezo. Samkiel germanoj, kiuj en la 90-aj jaroj denove pledis por tradicia valoro, eble en la estonteco la ĉinaj junuloj rigardos serioze kaj racie al la vestoj kun fama marko.

La konsumata principo de ĉi-



Ludo de bovligno

naj junuloj senĉese ŝanĝiĝis laŭ la socia evoluo: En la 60-70-aj jaroj, pro malriĉeco oni modeste vivis kaj ŝparis monon por geedziĝo aŭ eventuala uzo, nome "elspezi la hieraŭan monon"; en la 90-aj jaroj la riĉiĝintaj ĉinoj konsumas pli laŭplaĉe kaj malavare ol antaŭe, kaj pli kaj pli multaj homoj ŝatas "elspezi la hodiaŭan monon"; influate de okcidentanoj, iuj ĉinoj komencis amortizati konsumadon, nome "elspezi la morgaŭan monon". Enketo montras, ke en 1997, duono da junaj aŭto-aĉetintoj elektis amortizon. En Shenzhen (Ŝenĝen), la plej frue malfermita urbo en Ĉinio, plejparto da junuloj amortize aĉetis apartamenton je kredito.

PLI GRAVA RESPONDECO

Dum unu kaj duona jaro post la geedziĝo Xiao Wang kaj lia edzino apenaŭ preparas manĝon en la hejmo, ĉar viziti restoracion kompreneble estas multe pli oportune kaj komforte. Ili samopinias, ke preferindas la nuna seninfana situacio kun multaj ĝuoj. Por geedzoj Jutao kaj Xiaopei estas malfacile kune manĝi en ĉiu semajno. La edzo ĉiam okupiĝas pri traktado kun komercistoj-klientoj, kaj la edzino pri televida raportado. En plejparto da tempo de ĉiu jaro, Weixing, oficisto de

la Ŝtata Turisma Buroo, vivas alilande pro ofico. Li sin vestas per italaj ledŝuoj kaj skotlanda lankoltuko, kaj ebriiĝis en fotado de mondaj vidindaĵoj per sia alta-preza fotografilo kun marko "Canon" kaj lertas en ludo de bovligno. Ĉe li, 30-jara, estas neniu signo por edziĝo. Malgraŭ okupiteco, ili opinias, ke kompare kun la vivo en la estonteco, la nuna estas leĝera. Laŭ ilia opinio, nasko de infano en la estonteco signifas respondecon pli gravan ol hodiaŭ.

Plie, la feliĉo de ĉinaj junuloj konsistas ankaŭ en tio, ke iliaj maljunaj gepatroj ne tiel multe kiel la antaŭuloj dependas de junuloj. Kun pensio la maljunuloj plejparte ne postulas de siaj gefiloj monon por vivtenado. Ĉe festotagoj Weixing ne forgesis aĉeti vestojn aŭ tonikajn manĝaĵojn por la gepatroj. Jutao kaj Xiaopei pagis por siaj gepatroj vojaĝon al alia lando. Kompreneble la gepatroj estas trankvilaj: Se ili malsaniĝos aŭ perdos la povon sin vivteni, la gefiloj certe helpos ilin.

Tiuj, kiuj ankoraŭ ne naskis infanon kaj kies gepatroj ankoraŭ estas sanaj, alte taksas la nunan leĝeran vivon. Samtempe ili penadas sin prepari por la morgaŭo, ĉar morgaŭ la respondeco estos pli grava. ■



YA QIU:

Knabina Esperanto-ĥoro

MAJON de 1997, en mezlernejo de Guilin, Guangxi, fondiĝis la Knabina Esperanto-ĥoro el 42 membroj, gvidata de juna instruistino. La plenbarba Lu Jixin instruas al ili Esperanton. Por la de lernotasko ŝarĝitaj knabinoj, aliĝi al la ĥoro ne estas facile. Tamen per sia ago ili montras al la lernejo kaj la socio, ke ili povas bone aranĝi ne nur sian lernadon, sed ankaŭ la kantadon. Por ili la plia rikolto estas, ke ili akiris multajn postlernejajn sciojn. Iatempe, ili kaptis la atenton de amaskomunikiloj. La lernejo estas tiel fiera pro ili, ke ĝi faris por ili ruĝajn T-ĉemizojn kaj blankajn jupojn.

Kiel viglaj ili estas en tiaj vestoj kun verda kant-kajero en la manoj!

Post la fondiĝo de la ĥoro la knabinoj lernis prononcon de Esperanto kaj sin ekzercis pri la kantoj “Hongkong iras al mi”, “Avo donis al mi kerkon*”, “Kanto kaj rideto”, “Odo al ĝojo” ktp.

en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La knabinoj kun averaĝa aĝo de malpli ol 14 jaroj neniam antaŭe kontaktis Esperanton, tamen interesiĝis pri kantado en Esperanto kaj posedis la prononcadon tre rapide. Ili deziras, ke la amikoj en la mondo aŭdu la voĉon de ĉinaj knabinoj. Pasintjare, ili multfoje prezentis en la Geknaba Palaco kaj Xishan-

parko de Guilin. Oni surbendigas kaj disaŭdigis iliajn kantojn. La Guilin-a Televida Stacio produktis la televidan filmon “Kantoj por la tuta mondo” kaj telesendis ĝin eĉ dum unu semajno.

Nun la ĥoro lernas Esperanton kaj Esperantajn kantojn dufoje ĉiumonate. Ili deziras kontakti pli multajn amikojn. Adr.: Wang Qiao, Zhongshan Zhongxue, Guilin, CN-541001, Ĉinio; aŭ Lu Jixin, P.O. Box 81, Guilin, CN-541004, Ĉinio. ■

* Ĉina ornama floro de viola koloro.

“LA BLUA BIRDO” EN ĈINIO

Fotoj de HAN SHIPING

EN la pasintaj 90 jaroj artistoj de diversaj landoj prezentis la faman dramon “La Blua Birdo” en diversaj manieroj kaj malsamaj lingvoj.

Ekde la premiero okazinta en 1908, la dramo de belga dramisto Maurice Maeterlinck per sia originala ĉarmo fascinis multajn artistojn. Al la prezento de la dramo la artistoj dediĉis sian grandan atenton kaj talenton. La dramo interesis diverslandajn infanojn de pluraj generacioj kaj edifis ilin en la batalo por la feliĉo.

Februare de la kuranta jaro la Ĉina Infana Teatro surscenigis la operon La Blua Birdo, adaptaĵon de la dramo, faritan de japana teatra trupo. Ĝi estas du-akta kaj 10-scena, kun jena teksto.

Antaŭvespere de la Kristonasko filo de arbohakisto kaj lia fratino vidis en la sonĝo diablinon, kiu petis la gefratojn serĉi por ŝi bluan birdon, simbolon de feliĉo, kiu kapablas kuraci la malsanon de ŝia filino. La diablino donacis al la knabo ĉapon kun brilanto. Li turnis la brilanton kaj la diablino


transformiĝis en belan reĝinon. Aperis Pano, Akvo, Fajro kaj Lakto. Ekparolis Hundo kaj Kato. La reĝino sendis feinon akompani la gefratojn en serĉado de blua birdo. Ili atingis la Landon de Memoro, palacojn de nokto kaj feliĉo, arbaron, tombejon, Landon de Estonteco. Ili vidis siajn geavojn, kiuj mortis antaŭ longe. Ili trovis bluan birdon kaj perdis ĝin, kio ripetiĝis plurfoje. Vekiĝinte frumatene, la gefratoj trovis, ke la birdo en ilia hejmo ja estas blua. Ili donacis la bluan birdon al filino de la najbara maljunulino, ĉar la knabino estas malsana kaj bezonas ĝuste ĉi tiun bluan birdon. ■

Infanoj de la Lando de Estonteco, venontaj al la homa mondo



Feoj disputantaj pro malkonkordo de Hundo kaj Kato





La gefratoj renkontiĝas kun siaj
gevoj en la Lando de Memoro



La gefratoj kaj feliĉaj knabinoj en la
Palaco de Feliĉo

Feoj aperas je turno de la brilianto.





Najtingaloj ekflugantaj




La feino en la arbaro

Montpeliero gastigos la 83-an UK

EN 1905 la Unua Universala Kongreso de Esperanto okazis en Boulogne-sur-Mer de Francio. Post tiam Francio gastigis tri kongresojn respektive en 1932, 1950 kaj 1957 (la Pariza Kongreso en 1914 ne okazis). Pro tio Francio fariĝis unu el tiuj landoj, kiuj plej multe gastigis UK. Post la paŭzo de 40 jaroj la Unuiĝo Franca por Esperanto, fondita ĝuste antaŭ 100 jaroj, invitis la 83-an UK, kiu okazos en Montpeliero en suda Francio de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1998.

Montpeliero, kiel la centro de la regiono Langvedoko-Rusiljono, najbaras al Mediteraneo kaj troviĝas sur la romia vojo konstruita ĉe la fino de la 2-a jarcento a.K., kiu ligis Italion kun Hispanio. Tamen Montpeliero naskiĝis nur ĉe la fino de la 10-a jarcento. Poste, tie fondiĝis jura kaj medicina lernejoj. En 1222 establiĝis Universitato de Montpeliero, kies medicina fakultato famis tra la mondo en Mezepoko. En la 13-a jarcento la urbo riĉiĝis dank' al la tekstila industrio kaj negoco. Dum la

La medicina fakultato de Universitato de Montpeliero



regperiodo de Luiso la 14-a (1643-1715 sur trono) Montpeliero fariĝis ĉefurbo de la regiono Langvedoko kaj plibeliĝis. En la 19-a jarcento nova fervojo faciligis negocon, precipe tiun de vino.

En la 20-a jarcento Montpeliero daŭre disvolviĝas. Nun ĝi havas 220 000 loĝantojn. En ĝi estas mezepokaj katedraloj, botanika ĝardeno konstruita en la 16-a jarcento kaj ankaŭ ĉi-jarcentaj zoologia ĝardeno, muzeo kaj novaj kvartaloj. En la promenejo Peyrou konstruita en la 17-a jarcento oni povas ĝui la arkitekturon de la urbo kaj belan pejzaĝon de Mediteraneo.

La ĉi-jara kongresejo estos en "Le Corum" inaŭgurita en 1988. Tiu moderna konstruaĵo situas apud agrabla ombra promenejo, tuj ĉe la rando de la malnovaj kvartaloj kun mallarĝaj stratoj kaj imponaj domegoj, ankaŭ tuj ĉe vigla komerca centro. Je kelkaj kilometroj ĝi distancas de Mediteraneo kun larĝaj sablaj strandoj kaj pitoreskaj havenetoj kaj de montoj kun ŝtonaj vilaĝoj kaj misterplenaj kavernoj. Vidindas ankaŭ romiaj restaĵoj, mezepokaj kirkoj, modernaj feriejoj, vastaj vitkampoj. Montpeliero delonge allogas per turismo kaj negoco.

Montpeliero estas atingebla per aviadilo el Parizo, Nico, Lilo, Barcelono, Strasburgo, Londono kaj Kopenhago, per rapida trajno el Parizo aŭ Liono, per trajno aŭ aŭtobuso el Lilo, Bordojo, Bruselo kaj aliaj urboj.

La kongresa temo estas "Mediteraneo — ponto inter kulturoj". Ĝi ebligas al la kongresanoj pli bone koni la kulturon de la mondregiono, kie la kongreso okazos, kaj ankaŭ esplori la rolon de nia specifa interkultura ponto, Esperanto. ■

Dum la 83-a UK:

- La redakcio de "El Popola Ĉinio" okazigos kunsidon de legantoj kaj perantoj, kies daton, horon kaj salonon oni bonvolu konsulti la Kongresan Libron.

- Du novaj servoj aperos la unuan fojon kadre de la UK: elektronika servo; infanĉambro (ne depono!) por ĝis-7-jaraj infanoj de la kongresanoj.

- Poŝtkartoj kun Esperanta teksto kaj T-ĉemiozaj kun simbolo (= glumarko) de la UK estos vendataj.

- Estos tre variaj ekskursoj al maro, montoj, grotoj kaj muzeoj.

Kamparano-artisto kaj liaj argilaj metiartaĵoj

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de JIN YAOWEN

SUB la mirindaj manoj de maljuna kamparano Yu Qingcheng (Ju Ĉingĉeng) peco post peco da argilo ekhavis animon. Post ripetada knedado la argilaj pecoj fariĝis viroj kaŭre tagmanĝantaj ĉe vilaĝa enirejo, virinoj kudrantaj en kandellumo kaj maljunuloj instruantaj nombradon al sia nepo.

Mi vidis argilajn figurojn faritajn de Yu unuafoje en televido: vilaĝanino kun pajla korbo surdorse revenas hejmen. Ŝiaj pufaj mamoj pendas ĝis la ventro. Ŝia fileto baras al ŝi la vojon kaj senpacience mamsuĉas sian patrinon... La honesta virino plene montras patrinan amon... La artisto per aŭdaca nudigo kaj troigo prezentas la grandan patrinecon. Li diris: “Mi malkovras animon de argilaj figuroj.”

En la argila metiartaĵo “Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero” la mamoj de la virino estas pli grandaj kaj pufaj: unu pendas ĉe la brusto kaj la alia surdorse. Paro da infanoj avide suĉas ilin. Ĉi tie la abunda lakto de la patrino aludas akvon de Yangzi kaj la Flava Rivero, kiuj nutras la ĉinan nacion. Kun profunda filozofieco kaj troigita formo la argilaj figuroj de Yu aspektas modestaj, simplaj, humuraj kaj animitaj.

La maljunulaj figuroj, kneditaj de Yu, radias ankaŭ belecon kaj infanecon. Ili domaĝas eĉ malgrandan estaĵon en la naturo. Naveco tiklas ilin kaj sinbeligo daŭre

frapas ilian koron. La artisto tre lerte kaptis la homan naturon kaj montras ĝin per kruda maniero. En la argilaĵo “Kolekti Fabojn” la ĝiba maljunulino kun presbiopaj okulvitroj prenas sojfabon de sur la tero kun granda malfacilo. En la argila metiartaĵo “Du Floroj” la maljunulo per raspaj manoj kun



Yu Qingcheng en skulptado

elstaraj artikoj metas du sovaĝajn florojn sur la hararon de sia edzino, dum la presbiopa maljunulino kun sulkoplana vizaĝo rigardadas sin en spegulo... La artisto komparas tiun maljunan paron kun du floroj. Li diris, ke ĉe la maljuniĝo la homoj fariĝas naivaj. Yu mem estas homo kun infana koro. Li diris: “Argilo estas tre valora por mi kaj mi volas


per ĝi manifesti miajn amon kaj malamon.” Li knedis argilan maljunulon kun maizospiko en la sino. La de li faritaj argilaj artaĵoj elspiras idilian etoson.

Antaŭ 54 jaroj s-ro Yu naskiĝis ĉe la piedo de Panshan-monto, oriente de Pekino. En la aĝo de 16 jaroj li finis sian lernadon en mezlernejo. Poste li paŝtis ŝafojn, kulturis teron kaj fine ekokupis sin je argila knedado. Lia arto temas ekskluzive pri vilaĝaj aferoj, kio kortuŝis multajn. Boksisto Ali skribis post rigardado de liaj artaĵoj: “Ili estas valoraj same kiel donacoj por la Dio.” Francoj eniris en lian dometon de argilaĵoj. Ili ne volis foriri eĉ post la vizito. Ili diris al la vilaĝestro: “De nun vi devas nomi s-ron Yu majstro.” Kaj studentoj el la belartaj lernejoj de Ĉinio kaj tiuj el Universitato de Harvardo ne komprenis, kial kamparano sukcese kreis tiel mirindajn artaĵojn. Montrante argilaĵojn en la domo, s-ro Yu diris kun rideto: “Mi mem estas tia homo.”


Estas vere, ke s-ro Yu heredigis la honestecon, sincerecon, saĝon kaj humuron de la kamparanoj al siaj argilaj infanoj. Li rigardas ilin kiel siajn familianojn kaj volonte dediĉas al ili sian tutan vivon. Kiel ajn malriĉa li estas, li ne volas vendi eĉ unu el ili, tial pli kaj pli da argilaj infanoj akompanas lin tage kaj nokte, montrante la animon de sia “patro”.




Gemaljunuloj



Patrino kaj filoj



Patro kaj filo



Fratoj

Maljunulo kun maizspikó



TRI FABLOJ

Alcedo movis sian neston

Por eviti atakon, la alcedo metis sian neston sur tre altan branĉon. Elkoviĝis idoj, la alcedo-patrino tre ŝatis ilin. Timante, ke la idoj falos, la alcedo movis la neston al malpli alta loko. La birdetoj ricevis plumojn kaj pli plaĉis al la alcedo, kiu poste movis la neston ankoraŭ malpli alten. Kaj el tio rezultis, ke lupo forprenis la birdetojn.

Pro malutilo de musoj

Iu suferegis de malutilo de musoj. Li petis de alia katon, kiu tre lertis kapti musojn kaj ankaŭ ŝatis manĝi kokojn. Pasis pli ol unu monato, en lia hejmo ne plu vivis musoj nek kokoj. Lia filo abomenis la katon kaj demandis la patron: “Kial vi ne mortigis ĝin?”

La patro respondis: “Tion vi ne komprenas. Ni suferis de malutilo de musoj, sed ne de manko de kokoj. La musoj ŝtelis nian grenon, morddifektis niajn vestojn, truis niajn murojn kaj rompis niajn agrokulturilojn. Sen la kato ni suferus malsaton kaj froston. Pro manko de kokoj ni ne havas ovojn por manĝi, sed tio ne gravas. Kial ni mortigus la katon?”

Naŭkapa birdo

Sur monto estas birdego kun naŭ kapoj. Vidinte manĝaĵon, ĉiuj ĝiaj kapoj ekkriis kaj strebis por ĝi. Ili interbatalis kaj vundiĝis, tamen neniu akiris la manĝaĵon.

Sovaĝa anaso mokis ilin: “Pripensu vi ĉiuj, naŭ kapoj englutas la manĝaĵon en unu saman stomakon!”



NEKROLOGO

Nora Moerbeek-Bartels (1930-1998), dumviva membro de UEA, delegito pri blindulaj aferoj kaj E-instruado, mecenato de ĉinaj esperantistoj, forpasis la 17-an de marto en Beverwijk, Nederlando. Tre aktiva en la blindula medio esperantista, ŝi estis sekretario en la 70-aj jaroj de NOSOBE, la nederlanda societo de esperantistoj vidhandikapitoj, kasisto (1983-89) kaj sekretario (1992-98) de Ligo Internacia de Blindulaj Esperantistoj, redaktoro de ties revuo *Esperanta Ligilo*. Ŝi gvidis Tutmondan Asocion de Esperantistaj Nefumantoj kaj estis honora membro de Asocio Esperantistaj Handikapuloj. Ŝi esperantigis la popularajn *Anne Frank ne estas de hieraŭ* (1988) kaj *Taglibro de Anne Frank* (1997) kaj tradukis en la nederlandan *Sur kampo granita* de I. Nemere (1997). En 1996 ŝi ricevis la kvinan gradon de la ordeno Oranje-Nassau pro sia Esperanto-agado.

NORDORIENTAJ TIGROJ REVENOS EN LA NATURON

Teksto kaj fotoj de DI XIANGHUA

Marte, la Suno-insulo, Harbin, Ĉinio, estas neĝkovrita. Tie estas la Ĝardeno de Nordorientaj Tigroj, unuarange protektataj de la ŝtato.

Liu Xinchun, mastro de la ĝardeno, diris al mi, ke antaŭ cent jaroj en la mondo vivis 10 specioj da tigroj, sed nun restas nur 6 specioj kun

malpli ol 5 000 tigroj, kaj ĉiutage almenaŭ 2 tigroj malaperas. Laŭ kalkulo, en la venontaj 10 jaroj la tigroj malaperos en la mondo. Meze de la 80-aj jaroj, aplikante avangardajn ekipaĵojn kaj teknikojn, ĉinaj zoologoj priserĉis la arbaron de Changbai-montaro, kie vivas

Bredistino kaj tigridoj



Observado de tigrida vivo


nordorientaj tigroj. Sed ili trovis nur 7 tigrojn. Kun aldono de nordorientaj tigroj bredataj en ĉinaj zooj kaj tiuj en la landlima zono de Ĉinio, Rusio kaj la Popol-demokratia Respubliko de Koreio la nombro de tiaj tigroj estas malpli ol 300. En 1994 la Monda Fonduso de Sovaĝaj Bestoj enlistigis nordorientan tigron kiel unu el la 10 pereantaj bestoj.

Liu Xinchun fondis en 1986 la Centron de Generado kaj Bredado de Felisedoj en Hengdaohezi de Heilongjiang. Li kredite prenis 16 milionojn da juanoj kaj aĉetis 12 tigrojn el zooj de grandaj urboj. Post 10-jara generado kaj bredado la nombro de tigroj atingis 108. La centro ankaŭ kulturas en ili la kapablon vivi en la naturo.

Liu Xinchun diris: “Ni esperas efektiviĝi la planon liberigi la tigrojn en la jaro 2015. Por ke nordorientaj tigroj libere vivu en la naturo, necesas ankaŭ bona kunlaboro de departementoj destinitaj por protekti la naturon kaj sovaĝajn bestojn.”



Nordorienta
tigo



Galopado




Je vido de ĉasaĵo



Persekutado

Tigrino kaj ĝiaj idoj




LAŬ LA SILKA VOJO

Produktejo de

Teksto de LI LIANG

Fotoj de LIU SIGONG





jado

ELIRINTE el la vasta dezerto Taklimakan, ni kun granda plezuro revidis kampojn kaj vilaĝojn. La verda koloro vekis ĉe ni pli fortan deziron rigardi la lokon, al kiu ni estis veturantaj.

GRAVA URBO ĈE LA SUDA BRANĈO DE LA SILKA VOJO


Kiel plej bela pejzaĝo en la dezerto en suda Xinjiang, flavaj kaj verdaj poplaroj (*Populus diversifolia*) anoncis alternon de somero kaj aŭtuno. De Minfeng ĉe la suda fino de la ŝoseo ni veturis okcidenten laŭ la rando de la dezerto. Post pli ol kvar horoj ni atingis Hotan.


Hotan signifas tibetlingve produktojn de jado. En la jaro 60 a.K. ĝi apartenis al prefektujo starigita de la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.—24 p.K.) en la Okcidenta Regiono. Ĝi estis grava urbo traირata de la suda branĉo de la Silka Vojo, fama urbo de jado kaj tapiŝo kaj centro de bredado de silkraŭpoj kaj teksado de silko en Xinjiang.

Sed nun en Hotan apenaŭ troveblas modernaj konstruaĵoj. La urbanoj portas simplajn vestojn kaj 98% de ili estas ujuguroj kredantaj je islamismo.

Laŭ ĝia nuna aspekto oni malfacile povas imagi, ke ĝi estis regno, kie furoris budaismo. Sed historie ĝi funkciis ne nur kiel komercejo sur la Silka Vojo, sed ankaŭ kiel kunfluejo de la kulturoj orienta kaj

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO






Avalokitesvaro (Jada skulptaĵo)



Vazo kun gravurita drako



Ok-angula kiosko (Jada skulptaĵo)



Jada fumujo



Jada florvazo



Jada kruĉo



okcidenta. Tie troviĝis pli ol 80 budaismaj temploj. Meze de la 19-a jc., eŭropaj ekspedicianoj malkovris en la dezerto Taklimakan najbare de Hotan grandan kvanton da almenaŭ mil-jaraj kulturaj restaĵoj, kiaj silkaĵoj, lignaĵoj kaj lakaĵoj kun diversaj delikataj gravuraĵoj, freskoj kaj skulptaĵoj en stiloj orienta kaj okcidenta, kaj ĉinaj kaj persaj moneroj. Tie troveblas signoj de la kvar kulturaj sistemoj de la mondo: skulptaĵoj de la Pagoda Templo Revake kaj lignaj gravuraĵoj de Niya-ruino spegulas la helenajn budaismajn arton kaj aktivadojn; sur sigeliloj faritaj de antikvaj lokanoj estas helenaj diaj figuroj delikate gravuritaj; freskoj en la budaisma templo Dandanwulike montras la pentrarton de antikva Hindio; uzado de persaj moneroj kaj centra-azia lingvo pruvas, ke tie disvastiĝis la centra-azia kulturo; fajencaĵoj, ĉinlingvaj dokumentoj kaj moneroj atestas la regadon de Ĉinio super la loko ekde Handinastio...

Kiel komercejo sur la Silka Vojo kaj centro por disvastigi la hindan budaismon, Hotan ludis gravan rolon en la kampoj komerca kaj kultura de la Okcidenta Regiono.

Bredado de silkraŭpoj



URBO DE JADO

La riveroj Karakax kaj Yurungkax trafluas Hotan. Prin-tempe kaj somere, akvo de dege- linta neĝo malsupren fluis, kun- portante rokojn de sur la mon- taro Karakorum. Post longa tra- lavado la rokoj sedimentis en ebena parto de la rivero Yurung- kax en Hotan, kaj formiĝis fama Hotan-a jado. En seka sezono, kiam la rivero senakviĝis, mul- taj lokanoj iris tien por kolekti jadon.

Jam en la Okcidenta Zhou- dinastio (ĉ. 11-a jc. a.K. — 771 a.K.) Hotan-anoj ekkolektis ja- don en la rivero. Pro multeco de specoj kaj bona kvalito, Hotan- a jado estis ĉefa tributo de Xin- jiang por la kortego. La kvinmil- kilograma jadoskulptaĵo “Yu Bridas Riveron” kaj vesto farita el 2 498 jadolamenoj kunligitaj per oraj fadenoj sur la kadavro de princo de la Okcidenta Han- dinastio estas rigardataj kiel la plej elstaraj el la Hotan-aj jadaĵoj. En la 15-a jc. la hispana diplo- mato kaj vojaĝisto Ruy González de Clavijo de la 15-a jc. alte tak- sis Hotan-an jadon en sia verko: La produktaĵoj de Hotan estas ege altvaloraj kaj ĝiaj metiistoj — senegalaj en la mondo pro sia

lerteco en jada tajlado kaj in- krustado.

Hodiaŭ la tradicia jada skulp- turo ankoraŭ furoras en Hotan, sed estas pli malfacile kolekti bonkvalitan jadon. Pro tio pli kaj pli multaj jadokolektantoj sin turnis al Qiemo-gubernio de Hotan. En la vestiblo de hotelo en Qiemo ni vidis 1 502-kilo- graman verd-blankan jadon el minejo ĉe la norda piedo de la montaro Kunlun. Por transporti ĝin al Qiemo oni siatempe kon- struis montvojon longan je 21 km.

El la diversspecaj Hotan-aj jadoj la plej valora estas blanka jado pro siaj kvalito subtila kaj koloro blanka kiel ŝafa graso. Pro tio ĝi portas ankaŭ la nomon ŝaf- grasa jado. En Ĉinio jado sim- bolas virton, feliĉon kaj favoran aŭspicion.

Fakte, la nunaj plej elegan- taj jadaĵoj estis faritaj de elstaraj metiistoj el Pekino, Suzhou kaj Hangzhou: oni aŭ transportis jadon al la menciitaj lokoj aŭ venigis tieajn metiis- tojn al Hotan. Post longtempa ekonomia dekadenco, oni mal- facile povas trovi talentajn metiis- tojn en Hotan. La de ni vizititaj jadoskulptejoj estas negrandaj, tamen la skulptistoj tre okupi- taj. Ili jam kutimiĝis labori en ĉeesto de turistoj.

Ambaŭflanke de la 200-300- metra strato en Hotan staras unu apud alia butikoj de jadaĵoj skulptaĵoj. En iuj el ili troviĝas ankaŭ antikvaj moneroj, el kiuj la plej valora estas Maqian (La vorto signifas ĉinlingve ĉevalan moneron). Laŭdire en la Ĉina Historia Muzeo en Pekino kon- serviĝas nur unu tia monero. Mastro de tiu butikoj kaj direktoro de la kultura domo diris al ni, ke lastatempe oni eltrovis pliajn tiajn monerojn ĉe ruinoj.

TAPIŜOJ KAJ SILKAĴOJ

Lokano diris al mi, ke la

ŝafaĵo de Hotan estas la plej bona gusta el la samspecaĵoj en Xinjiang. Gustuminte tiun frandaĵon, mi volas paroli iom pri la Hotan-a ŝaflano.

Hotan-a ŝaflano renomiĝas per siaj dikeco kaj elasteco. Ĝi estas tre taŭga por fari tapiŝojn. Kiel silkaĵoj, ankaŭ la Hotan-aj tapiŝoj estis unu el la ĉefaj komercaĵoj sur la Silka Vojo. La tapiŝo-pecetoj elterigitaj en tomboj de la Orienta Han-dinastio (25-220) pruvis, ke la denseco de la varpo kaj vefto kaj maŝoj estas similaj al tiuj de la nunaj. Tio montras, ke la Hotan-a tapiŝo-farado jam atingis altan nivelon antaŭ pli ol mil jaroj. Jen kial Hotan-aj tapiŝoj estis tre ŝatataj de komercistoj eŭropaj kaj centra-aziaj. La naŭ stiloj de Hotan-aj tapiŝoj montras la tradicion de Sirio kaj Irano, kaj sur la tapiŝoj oni vidas ne nur eŭropajn rozojn, sed ankaŭ pejzaĝojn de centra Ĉinio. Evidente, la diversecon de la stiloj de la Hotan-aj tapiŝoj oni ŝuldas al la prospero de la antikva komerco.

Eĉ hodiaŭ, en ĉiuj bazaroj de Hotan la plej allogaj varoj ankoraŭ estas belaj tapiŝoj.

En Hotan cirkulas rakonto, kiu konigas, kiel silkraŭpoj eniris en la regnon Yutian (nun Hotan). Tiutempe la kortego en centra Ĉinio malpermesis eksporti silkraŭpojn. Por havi tiajn raŭpojn, la reĝo de Yutian sin svatis al princino de la kortego de Handinastio. Antaŭ ol okazigi la geedziĝan ceremonion, la sendito de Yutian laŭ ordono de la reĝo admonis al la novedzino, ke ŝi alportu silkraŭpajn ovojn al la regno, por ke oni povu fari veston por ŝi estonte. Do ŝi kaŝis silkraŭpajn ovojn en sia ĉapo kaj tiel alportis ilin al Yutian. Post tio, en Hotan ekfloris bredado de silkraŭpoj kaj kulturado de morusarboj.

Kvankam historiistoj konjek-

tis, ke Hotan-anoj ekbredis silkraŭpojn kaj ekkulturis morusarbojn en la tria jarcento, tamen historiaj libroj malofte mencias, ĉu silkraŭpo-bredado kaj morusarbo-kulturado prosperis en la loko antaŭ Qing-dinastio (1644-1911). Oni povas certigi, ke nur post kiam la garnizono gvidata de Qing-dinastia revizoro Zuo Zongtang eniris en la lokon, disvastiĝis bredado de silkraŭpoj en suda Xinjiang. Oni starigis administracion pri bredado de silkraŭpoj kaj kulturado de morusarboj por diskonigi avangardajn teknikojn de suda Ĉinio pri morusarbo-kulturado, silkraŭpo-bredado kaj silk-teksado.

Sub tiuj kondiĉoj produktiĝis fama Xinjiang-a atlaso. La gubernio Lop de Hotan estas ĝia ĉefa produkteto. El la kvar specoj de atlaso la nigra, kiu reprezentas la stilon de Hotan, estas la plej antikva kun strukturo konvena kaj desegnoj abstraktaj kaj elegantaj.

PAŬLO KAJ LIA FRUKTOĜARDENO

Paŭlo estas 30-jara usonano. Dum sia unua vojaĝo en Xinjiang li estis forte altirita de ties vasta teritorio kaj antikva civilizacio. Lia dua vizito puŝis lin al lernado de la lingvoj han-a kaj ujgura. Hazarde li rimarkis, ke la tieaj juglandoj estas grandaj kun maldika ŝelo. Do, en li naskiĝis ideo starigi tie fruktoĝardenon. Li sukcese persvadis iun usonan kompanion, ke ĝi faru esploron en la loko. La kompanio trovis, ke la tieaj naturaj kondiĉoj tre similas al tiuj de Kalifornio kaj la klimato, grundo, pluvo-kvanto kc. tre favoras al kulturado de iuj fruktoj ege ŝatataj en la internacia merkato.

Je la nomo de la usona kompanio, Paŭlo subskribis kontrakteton pri luo de tiu parcelo por 30 jaroj. Poste li aĉetis modernajn prilaborajn maŝinojn kaj importis bonajn francajn pirujojn kaj usonajn ĉerizujojn, abrikotujojn, persikujojn kaj pomujojn. Li kredas, ke iliaj fruktoj estas tre ŝatataj en Sudorienta Azio. Pro malalta produktokosto li estas fidoplena pri tiuj fruktoj en la merkata konkuro.

Fakte, Hotan famas de antikve pro sia naturdotita favoro al vegetaĵoj. Nun ankoraŭ prosperas 500-jara juglandujo en Hotan. Ĉiujare ĝi donas pli ol kvarmil fruktojn. En alia loko de




Paŭlo (la dua de maldekstre) en sia fruktoĝardeno

Hotan floras 500-jara figarbo. El ĝia ĉefa radiko kreskas du trunkoj. La kronoj kovras areon de 0.07 hektaro. Ĉiujare ĝi donas sen nombrajn figojn.


Akompanate de Paŭlo, ni vizitis lian fruktoĝardenon kun nur 3-4 dungitoj. Ĉiu fruktarbo estas ĉirkaŭita de fera reto. Li humure diris ĉinlingve: "Tie ĉi la leporoj estas petolemaj." Kondukante sian ĵipon, li multe babilis pri siaj edzino, infano, fruktoĝardeno kaj vojaĝoj tra Xinjiang.

La ĵipo kuris sur malglata vojo. De tempo al tempo pasantoj faris al li gestojn, ke li haltu. Kaj li varme akceptis ilin. Evidente, li jam kunfandiĝis kun la lokanoj. ■



1. Teksado de tapiŝo
2. Kunlun-montaro
3. En kokon-elbobenejo
4. Verd-blanka jado
1502-kilograma el
Kunlun-montaro
5. Prilaborado de jado





Huoj hieraŭ kaj hodiaŭ

de WEI GUOXIONG



Islamanoj

EN Ĉinio vivas 55 naci-malplimultoj, el kiuj la hujoj estas tre distingigaj. Ili ne estas etno disvolviĝinta el iu aparta klando aŭ tribo, sed formiĝis el pluraj etnoj ĉinaj kaj alilandaj en longtempa kunvivado.

EL MALPROKSIMO

Dank' al disvolviĝo de la mara negoco en la 7-a jc. arabaj kaj persaj komercistoj ŝipe veturis al Ĉinio. Ili faris negocon en Kantono, Hangzhou, Quanzhou (Ĉjüanĝoŭ) kaj aliaj ĉemaraj urboj kaj, kunportante en Ĉinion la islaman kulturon, konstruis moskeojn, la plej fruajn en ĝi. Multaj el ili fiksloĝiĝis en Ĉinio, geedziĝis al ĉinoj, ricevis posteulojn kaj iom post iom

fariĝis ĉinaj islamanoj.

Komence de la 13-a jc. multe da araboj, persoj kaj homoj parolantaj tuĝjue-lingvon venis en Ĉinion de la Okcidenta kaj Centra Azio. Ankaŭ ili kredis je islam. Ili kulturis teron, garnizonis, negocis aŭ servis kiel oficistoj en internaj lokoj kaj limregionoj de Ĉinio. Ili kunfandiĝis kun islamanoj loĝantaj en koncernaj lokoj de Ĉinio kaj geedziĝis al tieaj hanoj, uĝuroj, mongoloj k.a. Meze de la 14-a jc. formiĝis nova etna komunumo de Ĉinio, t.e. hujoj. En Ĉinio la hujoj loĝas dense, tamen en iuj lokoj dense. Ili troviĝas en pli ol 2 000 urboj kaj gubernioj de Ĉinio. Nun en ĝi vivas entute 8.6 milionoj da hujoj. Laŭ la nombro ili okupas

la kvaran lokon en Ĉinio, post la hanoj, ĝuang-oj kaj manĉuroj.

Prapatroj de la hujoj parolis la araban, persan aŭ tuĝjue-an lingvojn. Pro oftigo de kontaktoj kun hanoj, kaj precipe pro geedziĝo kun alietnanoj, iliaj lingvoj ne tute taŭgis al la socia vivo. Poste pro naskiĝo de la hujetna komunumo ili prenis la hanan lingvon kiel sian komunan lingvon, tamen en sia uzado ili aldonis al la hana lingvo multe da vortoj propraj al ili. Kaj en la religia aktivado ili uzas la araban lingvon.

TRADICIA KOMERCADO

La hujoj alte taksas komercadon kaj ankaŭ lertas en ĝi. Hodiaŭ, kvankam ili okupas sin je diversaj profesioj, tamen, menciante la komercadon, ili sentas fieron.

El la hujoj troviĝas ankaŭ multaj terkulturistoj. Multaj hujoj terkulturistoj kaj paŝtistoj kumulas komercadon. Iuj el ili faras bredadon kaj entreprenas metiojn. En la pasinteco la hujoj sin okupis ĉefe pri transportado kaj buĉado de bovoj kaj ŝafoj, vendado de islamaj manĝaĵoj, tando k.a. Hodiaŭ en iuj lokoj dense loĝataj de hujoj, troviĝas stratoj nomataj Ŝafaĵa Strato, Bovida Strato, Kamela Strato k.a. En marbordaj regionoj kaj grandaj urboj estas diversaj maklerejoj, metiejoj, vendejoj de trezoroj, juveloj, kupraĵoj, stanaĵoj k.a. Ankaŭ multas hujoj kolportistoj kaj etvendistoj.

En la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono loĝas 1.721 milionoj da hujoj, kiuj konsistigas trionon de la tieaj loĝantoj. En la transiro de la planizita ekonomio al la merkata la hujoj ricevis bonajn ŝancojn por evolvi sian talenton. Ili ekfunkciigis bredejon de mil bovoj, lanlavejon, vendejon de feloj aŭ laŭkontrakte ekspluatis vastan

virgan teron por kulturi grenon kaj arbojn. La ordinaraj kamparanoj jam fariĝis entreprenistoj kaj komercistoj lertaj ankaŭ en administrado.

MOROJ EL RELIGIAJ REGULOJ

Moskeo estas nemankigebla en la islama vivo. Ĝi estas ne nur loko, kie la islamanoj pasigas sian spiritan vivon, sed ankaŭ centro de ilia socia vivo.

La ĉinaj moskeoj portas du arkitekturajn stilojn: La moskeoj kun stilo de ĉina palaco, multe influitaj de han-stilaj konstruaĵoj, ĉefe en suda kaj norda Ĉinio, kaj la moskeoj kun araba arkitektura stilo, ĉefe en nordokcidenta Ĉinio. En iuj grandaj moskeoj vidiĝas reliefoj kun oraj vortoj el Korano.

Laŭ religia kredo kaj etnaj moroj de la hujoj, post transloĝiĝo de hujaj familioj en novan regionon, ili antaŭ ĉio konstruas tie moskeon por fari diservon kaj aliajn religiajn aktivadojn, duŝon, interŝanĝon de informoj kaj diskuton pri gravaj aferoj de la sametnanoj.

Islamismo influas la hujojn en ĉio dum ilia vivo, inkl. de geedziĝo, kostumo, dieto, higieno kaj aliaj. Multaj etnaj



Moskeo en Ningxia

moroj de la hujoj formiĝis el la religiaj reguloj. Ekz. laŭ la islama religio, antaŭ adorkliniĝo al Alaho oni nepre devas sin lavi, pro tio la hujoj estas puramaj kaj ŝatas lavadon. Preskaŭ ĉiu hujaj familio havas akvovazon pendantan sur la malantaŭa trabo de la domo. La vazo havas trueton sur la fundo. Ĝi estas ŝtopita, kiam oni ne duŝas sin. Sub la vazo estas kloako. Tie oni faras nur duŝon. En la ordinaraj tagoj oni lavas siajn manojn kaj vizaĝon per granda kruĉo.

Ĉe adiaŭo al la mondo ĉiu

hujo devas ricevi la lastan lavon. Laŭ islamo Alaho decidis ĉies naskiĝon, malsaniĝon kaj morton. La islamanoj opinias, ke ĉiuj naskiĝas puraj kaj, kiam ili forlasas la mondon, ili ankaŭ devas esti puraj kun neniom da malpuraĵo. La vizaĝo de la forpasintoj devas esti pura kaj bonordigita, la ungoj kaj la haroj devas esti tonditaj kaj antaŭ la enterigo ili nepre devas esti lavitaj, kaj por montri respekton al Ka'ba, la sankta palaco de islamo, la kadavroj nepre devas esti enterigitaj kun la kapo al Mekko. ■

Nekrologo

Josef Vanecek, 75-jara, forpasis la 8-an de januaro 1998. Li estis fondinto de la Internacia Klubo de la Asocio de Esperantistoj Handikapuloj kaj ĝia honora prezidanto. La asocion li sukcese gvidis dum multaj jaroj. Li estis surda kaj multfoje operaciita post strat-akcidento. Kiel kapabla inĝeniero li estis samtempe talenta pedagogo. Li intencis ankaŭ aranĝi la Trian Kongreson de Handikapuloj en Montpeliero. Oni tre doloras pro la perdo de la bonega esperantisto.

Paco-Kompanio servas al vi

La Paco-kompanio (Ĉinio) servas al investantoj, turistoj kaj fakuloj,

Importo kaj eksporto de komercaĵoj, internacia geedziĝo.

Registrita numero:
14896279-1

Adr.: Direktoro Ling Bo,
P.O. Box 2, CN-230001
Hefei, Ĉinio.

Tel./Fakso: +86-551-
2632545/-4484606

Eksterlandano lernas ĉinan humuran dialogon



Mark Rowswell kaj Jiang Kun

ONI povas diri, ke ĉinoj ŝatas Dashan. Ĉiufoje, kiam li aperas sur ekranu de televidilo, oni kun ĝojo krias: “Dashan! Dashan!” Dashan estas la nomo de komedia rolo ludita de iu bela kanada junulo Mark Rowswell en komedia teatraĵo. Ĉar li ludis tre bele, la spektantoj iom post iom forgesis lian nomon kaj vokis lin laŭ la nomo de la rolo.

S-ro Mark Rowswell ludis la rolon de Dashan en 1989, kiam li lernis la ĉinan lingvon en la Pekina Universitato. Lia instruisto diris al li: “Se vi komprenas la humuran dialogon de ĉinoj, vi do bone scios la ĉinan lingvon.” Humura dialogo naskiĝis en Pekino. Ĝi estas arto transformita el popola

humuraĵo. Oni povas ludi ĝin unuope, duope aŭ arope kaj paroli, imiti, ŝerci kaj kanti en la pekina paroltono, kaj pere de ridigo oni mokas malvirton kaj prikantatas virton, tial oni nomas la humuran dialogon ankaŭ parola karikaturu. Mark Rowswell estas junulo entreprenema. Kiam li informiĝis, ke s-ro Jiang Kun (Ĝjang Kun) estas unu el la plej bonaj aktoroj de humura dialogo en Ĉinio, li diris al sia instruisto, ke li volas disĉipliĝi al Jiang Kun. Jiang Kun, Ma Ji kaj Hou Baolin ĉiuj estas famaj aktoroj de humura dialogo en Ĉinio. (Ma estas instruisto de Jiang, kaj Hou — instruisto de Ma.) Kiel la 8a-generacia heredanto de la arto de humura dialogo en Ĉinio, Jiang Kun es-

tas tre rigora en disĉipligo. Informiĝinte pri la deziro de Mark Rowswell, li ne tuj montris aprobon aŭ rifuzon, ĉar li ne scias, ĉu la kanada junulo volas lerni humuran dialogon pro kaprico aŭ pro ŝato de tiu arto. Malgraŭ tio, Mark Rowswell jam konscie lernis de Jiang. Li kolektis fotojn pri prezentado de Jiang kaj komentojn pri ties arto kaj gluis ilin sur muro. Kiam li estis libera, li imitis lian parolon laŭ sonbendo. Foje, kiam li ricevis inviton de televido al prezentado, li telefonis al Jiang por peti liajn konsilojn kaj salutis lin kiel disĉiplo. Siavice Jiang volis plue koni la kanadan junulon kaj invitis: “Hodiaŭ vespere nia familio manĝos vermicelojn kun fermentinta sojfabo pasto, tio estas manĝaĵo kun pekina gusto kaj ankaŭ tradicia manĝaĵo de nia familio. Se la tempo estas oportuna al vi, do iru al mi por kuna vespermanĝo kaj babilado.”

Ĉe la tablo Jiang Kun konigis la kanadan junulon pri preparo de tia vespermanĝo, dume tiu junulo kun granda intereso manĝis kaj aŭskultis. Li diris: “Instruisto Jiang, mi interesiĝas pri ĉio en Ĉinio kaj volas provi ĉion. Kiam mi unuafoje manĝis en la studenta manĝejo de la Pekina Universitato, mi provis uzi manĝbastonojn kaj aĉetis teleron da fermentinta toŭfuo, opiniante, ke tio estas kuko. Kiam mi enbuŝigis ĝin, mi eksciis, ke tio estas tro sala, tamen mi englutis ĝin. En tiu tago mi trinkis 7 termosojn da

akvo.” Jiang eksplodis de ridego. Li trovis, ke tiu kanada junulo posedas humuron necesan por aktoroj de humura dialogo.

La kanada junulo daŭrigis, ke antaŭ sia veturo al Ĉinio li jam lernis la ĉinan lingvon 4 jarojn. Dank’ al tio li havigis al si multe da ĉinaj amikoj, kiuj konigas lin pri la Flava Rivero, Yangzi-rivero, la Imperiestra Palaco, Tibeto k.a. Pro tio Ĉinio pli kaj pli interesis lin. Li legis librojn pri Ĉinio, sed ne komprenis ĝiajn klasikajn poemojn, popoldirojn, proverbojn kaj multajn aliajn. “Jen mi decidis veturi al Ĉinio por kompreni ĉion nekomprenatan. Atinginte vian landon, mi eksciis, ke la ĉina kulturo estas senlima, profunda maro. Mi jam enmariĝis kaj ne volas elakviĝi. Mi do decidis naĝi en la maro de la ĉina kulturo. Jen mi komencis studi la ĉinan lingvon, ĉinajn ideogramojn, legi novelojn kaj romanojn, prezenti teatraĵojn...” Post paŭzo li malkaŝis sian deziron al Jiang: “Mi volas fariĝi 9a-generacia aktoro de humura dialogo en Ĉinio.”

Jiang estis kortuŝita de tiu kanada junulo kaj decidis akcepti lin kiel sian disĉiplon. Disĉipligo ja estas grava afero por la aktoroj de humura dialogo en Ĉinio kaj por tio oni devas okazigi solenan ceremonion. Kutime en la ceremonio disĉiplo devas ne nur trifoje adorkliniĝi antaŭ sia majstro kaj deklari la rilaton inter majstro kaj disĉiplo kiel tiun inter patro kaj filo, sed ankaŭ same rilati kun la edzino de sia majstro. La ceremonio por Mark Rowswell okazis en halo de alilandaj studentoj en la Pekina Universitato. Tiutage Mark Rowswell montris al Jiang palruĝan ĉinstilan robon kaj demandis lin, ĉu estas dece por li porti tian robon. La edzino de Jiang eksplodis de ridego, ĉar antaŭe la aktoroj de humura dialogo ĉiam portis malhelkoloran robon. Jiang diris: “Mark Rowswell estas blankhaŭta. Liaj

haroj estas blondaj kaj okuloj bluj. Eble la palruĝa robo taŭgas por li.” Liaj vortoj ridigis la ĉeestantojn. Li proponis, ke oni ne sekvu la rutinan regulon por la ceremonio. Mark Rowswell do prezentis florojn al Jiang kaj lia edzino, trifoje riverencis antaŭ ili kaj ankaŭ trifoje antaŭ la aliaj pliaĝaj aktoroj. En gaja atmosfero Mark Rowswell fariĝis 9a-generacia aktoro de humura dialogo en Ĉinio.

Mark Rowswell bone tenas en la memoro la instruon de sia majstro: La afero de rido estas arto popola, sed ne triviala. La homoj sin okupantaj je tiu arto devas ne nur strebi al nobleco, sed ankaŭ diligente lerni aliajn artojn. Mark Rowswell ja estas tre diligenta en la studo. Foje Jiang citis 4 versojn el klasika ĉina poemo kaj donacis ilin al li. En la sekvanta tago la kanada junulo telefonis al Jiang, ke li jam trovis la originalon. Li diris, ke antaŭ la 4 versoj estas aliaj 8 versoj kaj nun li cerbumas pri ilia signifo. Por studi la klasikan ĉinan literaturon li notis plenkajeron da antikvaj ĉinaj ideogramoj. En 1992 Jiang kaj Mark Rowswell veturis al Hongkong por prezentado. En liberaj horoj ĉiuj aliaj pasumis surstrate, sed Mark Rowswell sin ŝlisis en ĉambro kaj legis klasikan ĉinan romanon. Li diris al Jiang: “Laŭ la plano post la prezentado vi ekzamenos min kaj nun mi frotas mian armilon, kvankam ĝi ne akriĝos, tamen rebrilos.”

La aktoroj de humura dialogo nepre devas klare prononci kaj lerte paroli. Tio ne estas facila por eksterlandanoj. Mark Rowswell neniam preterlasis ŝancon ekzerci sian langon. Kun tempopaso li spicis siajn parolojn per pli kaj pli da spritaĵoj, popoldiroj kaj proverboj. Iam li forte interesiĝis pri *kūajban*-o (rapidritma deklamado de versoj akompanata de bambuaj klakiloj). Kie ajn li estis, li murmuris laŭ la takto de *kūajban*-o. Por ne malhelpi aliajn

en ripozo, li sin ekzercis ĉe aŭtovoja trefkruciĝo. Se oni telefonis al li, oni aŭdis antaŭ ĉio ludon de *kūajban*-o kaj surbendigitajn vortojn: “Pardonon, Mark Rowswell forestas hejme, bonvolu diri...” Kaj kiam oni volis diri, oni subite aŭdis la voĉon de Mark Rowswell: “Kun kiu mi parolas? Kiel vi opinias pri mia prezentado?”

En la Novjara Tago de 1992, Mark Rowswell kune kun Jiang prezentis la humuran dialogon “Fama Majstro kaj Eminentia Disĉiplo”. Lia prezentado vekis varman aplaŭdon de la spektantoj. La ĉina spektantaro unuvoĉe aprobas lian ludon. Influate de li, alilandaj studentoj unu post alia disĉipliĝis al ĉinaj instruistoj. Poste li mem verkis humuran dialogon kaj prezentis kune kun sia majstro. Kaj krome, li sin okupis ankaŭ je ĉinigo de usonaj komedioj. Li diris: “Mi volas ludi la rolon de pioniro en la interŝanĝo de ĉinaj kaj okcidentaj komedioj.”

En 1993 Mark Rowswell flugis al Kanado por viziti siajn familianojn. Atinginte la hejmon, li tuj sendis al sia majstro poŝtkarton kun jena skribaĵo: “Majstro, mi ne scias, pro kio mi estas en Kanado tage sed ĉiam en Ĉinio nokte (en sonĝoj). Mi pensas, ke eble mi havos senton de hejmenreveno, nur kiam mi refoje suriros la teron de Ĉinio.”

Poste la kanada junulo edziĝis al ĉina knabino kaj nun ili havas belan filon. Li diris al Jiang, ke li deziras, ke lia filo fariĝu intelektulo en la estonteco, tial du monatojn post la naskiĝo de la bebo, Mark Rowswell devigis lin aŭskulti surbendigitajn poemojn de Tang-dinastio. Nun ankaŭ la patrino de Mark Rowswell vivas en Ĉinio. La unua frazo, kiun la maljunulino parolis ĉine, estas: “Kiel flugas aviadilo?” Je tio la nepo faras geston de flugo per siaj manetoj kaj zumas: “U-u-u.” El tio videblas, ke la bebo komprenas nur la ĉinan lingvon. ■

Nerenkontita amiko

LA telefon-lineo estis okupata, tamen post dekelk-foja turnado de la disko oni ankoraŭ ne volis forlasi la telefonon. Iuj devojiĝis en amafero, aliaj renkontis familian problemon kaj triaj havas vortojn por elverŝi. Finfine aŭdiĝis vortoj: "Saluton, ĉi tie estas varma virina lineo."

Je la 1-a posttagmeze prof. Liu Ying venis en la oficejon de la varma virina lineo pri familia problemo. Ŝi diris, ke estas 3 lineoj, kaj de lundo ĝis vendredo ili servas ĉiutage 11 horojn al konsultantoj senpage. Inter ili estas lineo prizorgata de specialistoj pri leĝoj, geedziĝo, familio, sano por virino kaj infano, seksa problemo, psikologia perturbo ktp. Tiutage ŝi zorgis pri problemo de geedziĝo kaj familio.

Apenaŭ ŝi iris en la ĉambron, la telefono sonis. Iu pli-ol-60-jara virino plorante diris, ke ŝia edzo enamiĝis al alia virino, kaj en la pasinta duonjaro ŝi malĝojegis kaj preskaŭ blindiĝis. "Kion fari?" Plorante, ŝi petis helpon de Liu Ying. Aŭskultante, Liu Ying analizis la problemon kaj donis al ŝi konsilojn.

Liu Ying diris al mi, ke en la lastaj jaroj la ekonomio de Ĉinio evoluis, kaj la popola koncepto ŝanĝiĝis. Ĉinaj virinoj renkontis novajn problemojn, ekz. eksteredzeca amo kreskis kaj rompis iujn familiojn. Liu Ying ricevis 8 telefon-vokojn kaj el ili 5 estas pri geedziĝaj pro-

blemoj. Ŝi veis, ke plejparte la ĉinaj virinoj estas kaŝemaj kaj eltenemaj, tial ili ne volas paroli eĉ pri sia malfeliĉo. La lineo konservas sekreton por ili, do ili volas elverŝi sian koron al ĝi. Krom specialistoj, ĉe la lineo estas ankaŭ volontuloj el diversaj entreprenoj, kiuj laŭeble donas al ili konsolon, analizas problemon por ili kaj donas al ili sciojn pri leĝo, seksa vivo kaj medicino. Tamen plej grave estas helpi ilin starigi memfidon kaj reakiri la normalan psikon.

Ĉe la lineo estas pli ol 100 deĵorantoj. Ili estas edzinoj, kiuj ricevis almenaŭ du-jaran edukadon en alternejo. Tiutage Xie, Yang kaj Ye frue venis. Pli-ol-50-jara Xie estas kuracisto pri psikologio de granda hospitalo. Kiel inspektistino, ŝi gvidas novajn konsultatojn, prizorgas

fakan kunvenon, organizas trejnan kurson kaj instruadon. Yang unuafoje prizorgis la lineon. Xie gvidas ŝin ĝis ŝi povos plenumi la taskon sola. Antaŭ tio, Yang akceptis 72-horan trejniĝon kaj faris praktikadon. Ŝi serioze diris: "Estas malfacile esti bona konsultato, ĉar ni devas havi sciojn pri psikologio, medicino, sociologio kaj leĝo, speciale pri interkomunikado." Ye estas juna, tamen ŝi jam laboris tie 3 jarojn. Ŝi diris, ke ĉar la volontuloj servas post laboro, tial estas malfacile por ili servi konstante. Tamen Ye ŝatas tiun ekstran laboron. Ŝi diris, ke helpi aliajn signifas helpi sin mem, nun ŝi fariĝis pli prudenta kaj ŝiaj rilatoj kun familianoj kaj aliaj estas pli harmoniaj.

Xie, Yang kaj Ye prizorgas sintezan varman lineon. Kom

Profesorino Liu Ying





Prizorgantoj de la varma virina lineo

pare kun la specialista, ĝia enhavo estas riĉa, ekz. kiel retiro edzon el maĝango, kiel komuniĝi kun instruistoj de infanoj kaj kiel defendi la proprieton antaŭ divorco. Antaŭ tiuj problemoj konsultatoj devas esti paciencaj kaj varmkoraj. Kiel diris Xie, krom helpi ilin fari decidojn, prizorgantoj devas ankaŭ doni al ili varmon kaj forton.

La 21-an horon Wang Xingjuan, direktoro de la lineo, forlasis la oficejon la lasta kaj laca. Rigardante lumajn fenestrojn ambaŭflanke de la strato, ŝi sentis konsolon kaj kontenton.

En 1992, kiam ŝi kaj aliaj 3 virinoj, kiuj studis pri virinaj problemoj, malfermis la lineon, telefono en Ĉinio ankoraŭ ne estis tiel populara, kaj ŝajne oni ankoraŭ ne kutimis telefoni, tial iuj timis ke la varma lineo ne varmiĝos. Nun oni ĉagreniĝas ke lineoj estas tro malmultaj. En la lastaj 5 jaroj ili ricevis 30 mil telefon-vokojn de konsultantoj, inter kiuj estis virinoj, viroj, pekinanoj kaj alilokanoj. Oni nomas la lineon "nerenkontita amiko". En Ĉinio estas kelkcent tiaj amikoj. Ilia plej granda deziro estas fari la servon pli kontentiga. ■

Unua Internacia Konkurso "Verd-stela Pokalo" pri Infanaj Pentraĵoj kaj Fotografaĵoj

Por akceli la kulturan interŝanĝon kaj amikajn rilatojn inter ĉinaj kaj alilandaj infanoj kaj por konigi Esperanton al infanoj, la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de "El Popola Ĉinio" kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo kune lanĉas la Unuan Internacian Konkurson "Verd-stela Pokalo" pri Infanaj Pentraĵoj kaj Fotografaĵoj.

Aĝolimo: Ĉiuj, kiuj naskiĝis inter 1986-01-01 kaj 1994-12-31 (inkluzive), rajtas partopreni la konkurson. Ni dividos infanojn 4-6-jarajn en la grupon A kaj 7-13-jarajn en la grupon B.

Temo: Ĉiaj temoj imagoriĉaj kaj interesaj por infanoj

Formato: Fotografaĵo en formato de 175 mm x 125 mm, pentraĵo de ajna speco en ajna formato.

Limdato: Konkursaĵoj devas atingi la Ĉinan Esperanto-Ligon ĝis la 31-a de aŭgusto 1998.

Sendante konkursaĵon al la Ĉina Esperanto-Ligo (P.O. Kesto 825, CN-100037, Beijing, Ĉinio), bonvolu indiki sur la koverto "Konkurso" kaj la naskiĝdaton alipapere.

Premioj: Ni aljuĝos la unuan, duan, trian premiojn kaj honoran mencion respektive por pentraĵoj kaj fotografaĵoj.

"El Popola Ĉinio" raportos pri la konkurso kaj aperigos parton de la premiitaĵoj, kaj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonos albumon de plej bonaj premiitaĵoj.

Cetere, ni disdonos la premiojn dum la 84-a UK en Berlino, 1999.

ĈINOJ KAJ INTERRETO

Ĉu Interreto en Ĉinio estas tiel populara kiel en aliaj aziaj landoj, ekz. Japanio? Kiel Ĉinio preparas sin al retiĝonta mondo?

RANTANEN AIMO (Finnlando)

de LIU CHUNKE

ANTAŬ 10 jaroj, paŝi surstrate kun portebla telefono en mano estis modo por junuloj, kiuj nun ŝatas montri sian retadreson sur la vizitkarto. Ambaŭ agoj montras modemon kaj diferencas nur en tio, ke la unua ricevis subtakson kaj la lasta aspektas sufiĉe implica kaj klera. Antaŭ tia adreso multaj ĉinoj surpriziĝis: Tiel rapide venas la epoko de komputera reto!

Ekde 1985, Ĉinio povas mem produkti mikrokomputeron. De tiam, precipe en la 90-aj jaroj, en la tuta mondo komputero rapide disvastiĝas en diversaj kampoj kaj okulfrape ŝanĝas la vivmanieron de multaj homoj. Kaj la kontakto de multaj ĉinoj kun Interreto okazis nur en la pasintaj du jaroj.

Komence de la 90-aj jaroj, en Ĉinio nur iuj sciencistoj kaj teknikistoj aplikis Interreton. Oktobre de 1994, la ĉina komputera informa reto konektiĝis



En ret-kafejo

kun Interreto. Post nur 3 jaroj, en Ĉinio jam 299 000 komputeroj estas ligitaj al la reto kaj estas 620 000 uzantoj. Surstrate de Pekino, en nur unu jaro aperas dekoj da ret-kafejoj, kiujn ĉiutage vizitas multaj reto-maniuloj. En gazetaro kaj televido ofte videblas raportaĵoj pri reto, kio atentigas la publikon pri la

rapida disvolviĝo de la mondo.

Plejparto de la ĉinaj uzantoj ligiĝas al Interreto per telefona lineo. La nombro de rektaj uzantoj estas nur 1/3 kiom ili. Nun en Ĉinio estas kvar ĉefaj retoj, kiuj ligiĝas respektive al Usono, Germanio, Francio, Japanio kaj Hongkong de Ĉinio. La totala povo de internacia elirejo

por Ĉinio estas 30 Mbps. Tiuj kvar ĉefaj retoj estas: Ĉina Eduka kaj Esplora Reto, Ĉina Scienca kaj Teknika Reto, Ĉina Reto de Oficejaj Komputeroj kaj Ĉina Informa Reto Ora Ponto. Ili ligas multajn altlernejojn kaj esplorajn institutojn de 31 provincoj kaj municipoj de Ĉinio. Jam pli ol 1 000 ĉinaj retoj ligiĝas al Interreto.

Kvankam plejparto de la informoj en Interreto estas angla-lingva, tamen Ĉinio ligis kelkajn retojn de ĉinlingvaj informoj al Interreto. Tiuj informoj pri ekonomio kaj financo tre plaĉas al tiuj, kiuj ne konas la anglan lingvon. Ekz. "Read on Line" diskonigas la tradician ĉinan kulturon, "Capital on Line" helpas loĝantojn de Pekino viziti kuracistojn, aĉeti varojn, entrepreni akciojn, serĉi okupon kaj sin amuzi. Pasintjare fondiĝis reta psikologia lernejo, kie oni ricevas konsultiĝon kaj trejniĝon psikajn kaj ankaŭ diskutas pri Aidoso, El Nino, piedpilko en Ĉinio ktp.

En la reto la ĉinaj uzantoj ĉefe serĉas informojn kaj tralegas, ne multaj sendas ret-poŝtaĵon kaj malmultaj ekspedas dokumentojn kaj teleretiĝas. Ret-komercado nun ĝermas en Ĉinio. La ret-uzantoj deziras informojn pri scienco kaj tekniko, komerco, financo, sociaj novaĵoj kaj feriado. Ili ĉefe estas studentoj kaj fakuloj pri tekniko, eduko kaj komputeriko, kaj malmultaj estas konsumantoj. Pri la ret-uzantoj: 80% estas junuloj; 1/3 loĝas en Pekino, kaj ankaŭ en Guangdong-provinco, Ŝanhajo kaj iuj ĉemaraj urboj estas multaj ret-uzantoj.

Ĉinio estas komencanto, kaj la povo de la internacia elirejo por Ĉinio limigas la aplikadon. Malrapideco kaj alta kosto estas ĉefaj problemoj por disvastiĝo de Interreto en Ĉinio. Ekz. la baza kosto por uzi la reton en Ĉinio estas 60 USD, trioble kiom tiu en Usono. Interreto en Ĉinio estas ankoraŭ nematura merkato.

Ni tre ĝojas, ke nia revuo El

Popola Ĉinio nun legeblas en Interreto. EPĈ kaj kelkaj aliaj gazetoj apartenas al la hejmpaĝo, kie oni povas ricevi informojn pri Ĉinio pere de diversaj lingvoj. Ekde la 3-a numero de 1998, niaj s-anoj povas legi nian revuon hejme per komputero.

Nun en Ĉinio pli ol 100 kompanioj havas servon pri Interreto. Pro alta investo multaj el ili ne havas profiton. Ĉi-jare, la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio decidis malaltigi la koston por internacia lineo kaj cifera-datena telekomunika reto kaj samtempe levi la povon de internacia lineo por Ĉinio. Ĉar Ĉinio havas telefonan reton, duan grandan en la mondo, oni antaŭvidas, ke Interreto multe ŝanĝos la vivon de ĉinoj.

Jenaj vortoj de iu ĉina ret-uzanto montras senton de ĉinoj pri Interreto:

"La reto malfermis por mi fenestron al la mondo. Ĝi donas al mi multajn informojn. Mi bedaŭros, se mi ne bone utiligas la reton." ■

Ĉinaj popolaj rakontoj (9) aperos en junio

En la pasintaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis 8 libretojn de ĉinaj popolaj rakontoj. Tuj ĝi aperigos la 9-an.

Monteto ekflugos kaj falos sur iun vilaĝon. Tion antaŭsciis "freneza" bonzo Jidian. Li avertis la vilaĝanojn pri la danĝero, sed neniu kredis lin. Kion li faris por savi la vilaĝon? Vi trovos solvon en la rakonto "Alfluginta monto".

Malriĉa fraŭlo trovis en sia kampo helikon kaj bredis ĝin en akvovazo en sia kuirejo. Kaj de tiam li ekhavis tagmanĝon pretan en sinsekvaj tagoj. Sed neniu el liaj samvilaĝanoj faris tion por li. Do kiu kaŝe helpis lin? La interesa rakonto "Heliko-knabino" diros al vi, ke tion faris knabino el la heliko.

Baleno havas truon sur sia kapo, tra kiu ĝi de tempo al tempo elŝprucigas akvon. Kiam kaj kiel ĝi ekhavis la truon?

...

Havu kaj legu la rakontojn, kaj kredeble ili interesos vin.

En formato 11x18 cm. Distribuata de la Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio", prezo: 4.00 USD, sendokosto: 1.00 USD.

“ŜARKOJ VENAS!”

“Ŝarkoj venas!” Kiam la homoj estis en la kolorriĉa submara mondo kaj rigardis la naĝantajn fiŝojn, ili nere-teneble ekkriis kun surpriz-iĝo kaj ĝojo. Por la pekina-noj loĝantaj malproksime de maro je ducent km, la akvario Submara Mondo apud la Pekina Laborista Stadiono estas taŭga loko por rigardi mar-estaĵojn. Post sia inaŭguro en la pasinta jaro ĝi akceptis ĉ. ses mil vizitantojn ĉiutage.

Tie en la ĉefa baseno kun 3 400 000 litroj da marakvo kaj aliaj 18 basenoj vivas pli ol 5 mil mar-estaĵoj, inkl. de ŝarkoj, palinuroj, asterioj kaj aliaj senvertebruloj el Ĉinio kaj aliaj landoj. Inter ili la plej granda ŝarko kun longo de 2.5 m venis el Usono kaj iuj aliaj el Aŭstralio. Tie miksioci-prinoj (*Myxioocyprinus asiaticus*) kaj acipenseroj aparte-

nas al la bestoj alfrontantaj danĝeron de pereo.

Uzante avangardajn tek-nikojn, oni instalas en ĝi sub-maran tunelon 120-metre lon-gan, moveblan trairejon kaj surteran konstruaĵon. En la tunelo la rigardantoj sentas, ke ili promenas kvazaŭ sur marfundo. En ĝi ili povas ĝui la submaran pejzaĝon kaj vidi, kiel subakvistoj nutras la ŝarkojn.

La artefaritan marakvon en la submara mondo konsis-tigas salo el la Ruĝa Maro kaj kranakvo de Pekino. Avan-garda filtro-sistemo garantias la purecon kaj kvaliton de la marakvo.

Ĝin fondis pekina kom-panio kaj limigita kompanio de submara mondo de Nov-Zelando. Por doni pli multe da ŝancoj koni maron, oni invitis fakulojn lekcii pri ĝi. Tie ankaŭ ĝueblas fotoj kaj

televidadaj filmoj pri mar-estaĵoj, mara ekologio kaj mara medio.

POPOLAJ OPERTRUPOJ

Jam finiĝis la presenta-do de Ŝaŭŝing-opero (loka opero de Ĉinio), aŭdeblis senĉesa aplaŭdado kaj la aktoroj plurfoje dankis la spektantojn.

La trupestrino diris, ke troviĝas pli ol 600 tiaj popo-laj trupoj en la provinco Zhe-jiang (Ĝeĝjang). Individue in-vestita kaj memstare admi-nistrata, ĉiu trupo konsistas el ĉ. 30 membroj. La trup-estro mem zorgas pri engaĝa-do. La popola opertrupo prezentas por kamparanoj kaj fiŝistoj ĉ. 600 fojojn ĉiujare.

Prosperiĝo de popolaj opertrupoj ne nur donis ar-tan ĝuon al kamparanoj, sed ankaŭ akcelis iagrade la refor-madon de la tradiciaj operoj



En “Submara Mondo” de Pekino

de Ĉinio, kiuj ne estas multe vizitataj nun.

VEGETALO KAJ SISMA PROGNOZO

En 1970 okazis sismo en la nordokcidenta parto de Ĉinio. Unu monaton antaŭ tio, en la loko 60 km for de la epicentro, leontodoj floris vintre. Du monatojn antaŭ la sismo okazinta en Haicheng, Liaoning, multaj abrikotarboj floris antaŭtempe. En 1976, antaŭ ol okazis la sismo en Tangshan, salikobranĉetoj velkis, bambuoj floris kaj fruktarboj refloris post fruktado. En la provinco Sichuan, hejmloko de grandaj pandoj, antaŭ granda sismo bambuoj grandaree velkis post ekflorado. Magnolioj refloris kaj multaj vernicioj (*Vernicia fordii*) mortis.

Tiuj fenomenoj vekis grandan atenton de sismologoj. En 1976 membroj de la Sismoprogrnoza Klubo de Japanio plurfoje trovis, ke kutime, la folioloj de sensitivoj disvolviĝas en tago kaj kunvolviĝas en nokto, sed antaŭ sismo, male.

Post esplorado sciencistoj opiniis: Dum formiĝo de sismo giganta premforto profunde de la terglobo kaŭzis elektran tension inter kvarcitoj, la elektra kurento malkomponis akvon en la kvarcitoj kaj ekestis elektraj korpuskloj. En speciala geologia strukturo tiuj korpuskloj estis puŝitaj al la surfaco de la terglobo kaj ŝvebis en la aero. Tial en ĝi ne mankis elektraj korpuskloj aŭ jonoj. Tio kaŭzis anormalecon al vegetaloj.

EL-NINO EN ĈINIO

En 1997 El-Nino puŝis la plejparton de la homoj sur la terglobo en katastrofojn. Ankaŭ Ĉinio estis en ĝia influ-sfero. En 1997 la neordinaraj trajtoj de la klimato en Ĉinio manifestiĝis en tio: Regis trosekeco en la tuta lando, precipe en la regiono norde de Yangzi-rivero; estis anormala la temperaturo, en la norda parto estis varme kaj en la suda varmete; de junio ĝis la unua tagdeko de aŭgusto, la temperaturo restis iom alta. Tio okazis alie ol antaŭe — En 1969, 1972 kaj 1976, jaroj de El-Nino, somere regis varmeto; kaj en la Nordoriento de Ĉinio malalta temperaturo kaŭzis malpliigon de grena produktokvanto. Sed, ĉi-foje, en la Nordoriento regis alta temperaturo. Tio ankaŭ montris, ke influas la klimaton en Ĉinio ne nur El-Nino, sed ankaŭ aliaj faktoroj.

Tiuokaze oni esperas pli multe koni la trajtojn de El-Nino kaj fari koncizan prognozon. Entreprenistoj kaj komercistoj esperas trovi komercajn ŝancojn pere de longtempa klimata prognozo. Ili eĉ intencas subskribi kun meteorologia departemento interkonsenton pri klimata servo. La ĉina meteorologia departemento tre atentis esploron pri El-Nino kaj faris kompare precizajn prognozojn. Tamen oni ankoraŭ ne povas doni sciencan tezon pri tio, ĉu plifortiĝos tajfuno en la jaro de El-Nino, kiam ĝi ne okazos ofte. Tiu demando baziĝis sur la fakto, ke en 1997 ĉemarajn lokojn de Ĉinio atakis malpli multe da tajfunoj ol en normala jaro. Tamen iu el ili kaŭzis aparte seriozan katastrofon.

Anonco

Okaze de la 83-a Universala Kongreso la urbestro de Montpellier proponas al ni ekspozicii pri Esperanto en la akcepteja halo de la urbodomo dum tri semajnoj. Ni estas dankemaj pro ĉia sendo de taŭga materialo pri lingva problemo, zamenhofologio, esperantologio, pri- kaj per-Esperanta informado, ankaŭ Esperanto-instruado en viaj lando/lingvo.

Bv. tuj sendi al:
ESPERANTO-EKSPOZICIO, 5 rue du Docteur Roux FR-34090 Montpellier, Francio.

Kunlaboro petata

La Hangzhou-a Komerca Kompanio "Esperanto-Maró" volas kunlabori kun ĉiuj E-organizoj kaj esperantistoj pri komerca traktado, varo-perado, poŝta aĉetado kaj interŝanĝo de varoj.

Adreso:
Direktoro Qiu Xirong, Jiefang Lu 24, Hangzhou CN-310009, Zhejiang, Ĉinio
Telefono:
+86-571-7071705
Telefakso:
+86-571-7035995

DAZHAI HODIAŬ

Fotoj de XU XIANGJUN, LI TAIHANG kaj GENG QINGHUA

Dazhai estis ekzemplo de la ĉina agrikultura produktado. Estis vaste laŭdataj la Dazhai-anoj, kiuj transformis mizerajn montojn kaj disvolvis agrikulturan produktadon per sia propra forto, peneme luk-tante kontraŭ ĉiaj malfaciloj. En la lastaj 20 jaroj, dum reformado de la ĉina ekonomia sistemo, la Dazhai-anoj forĵetis sian malnovan pensmanieron kaj akceptis novajn aferojn, firme persistante en sia bona tradicio kaj tutforte disvolvante la agrikulturan produktadon. Dank' al tio, la ekonomio de Dazhai multe progresis.


Kun agrokulturo kiel bazo la Dazhai-anoj energie entreprenis ĉefe la kampan konstruadon, plibonigis agrokulturajn kondiĉojn kaj mekanizis agrikulturon. Ĉio tio garantiis riĉan rikolton de greno kaj fruktoj.

Por sin pliriĉigi la Dazhai-anoj starigis ankaŭ vilaĝajn entreprenojn. S-ino Guo Fenglian, direktorino de la Dazhai-a Ĝenerala Ekonomidisvolva Kompanio, kaj rilataj personoj vizitis aliajn lokojn, lernis iliajn spertojn, venigis kapitalojn kaj teknikistojn. Dank' al iliaj klopodoj Dazhai starigis ok entreprenojn, kiaj la Dazhai-a Svetero-fabriko kune administrata de Dazhai kaj la Jiangyin-a Lanŝpina kaj Prestinktura Fabriko de Jiangsu, cementejo de la



Elementlernejoj de Dazhai

Zhongce-a Cementa Limigita Kompanio kune investita de Dazhai kaj Hongkong-a entreprenisto kaj Dazhai-a Limigita Kompanio de Vino. Nun Dazhai posedas fiksan kapitalon de 35 milionoj da juanoj (ĉ. 8.3 juanoj = unu usona dolaro), ĝia totala enspezo superis 10 milionojn da juanoj kaj ĝia jara pokapa enspezo atingis dumil juanojn. Krome, la Dazhai-aj infanoj senpage vizitas infanĝardenon kaj elementan lernejon; geknaboj ricevas subvencion en mez- kaj altlernejoj. La pli-ol-55-jaraj Dazhai-anoj ĝuas pension kaj ĉiuj Dazhai-anoj — kuracan asekuron. Nun la Dazhai-anoj estas malfermantaj la vojon disvolvi agrikulturon en la montregionoj en norda Ĉinio.





En la vilaĝa svetero-fabriko



Hejma bredado de kunikloj



Guo Fenglian

Atesto pri ĉina prahistorio

ĈINOJ kutime diris, ke la antikva ĉina civilizacio komenciĝis tiam, kiam Pan Gu (kreinto de la universo en la ĉina mitologio) apartigis la ĉielon de la tero. Tamen, modernaj ĉinaj historiistoj opiniis, ke ĝi ekis en la dinastio Xia antaŭ kvarmil jaroj kaj la periodo je pli ol mil jaroj antaŭ Xia estis "legenda erao", ĉar mankis rilataj arkeologiaj materialoj. Nur en la 70-80-aj jaroj de la kuranta jarcento, kiam ĉinaj arkeologoj eltrovis grandan kvanton da prahistoriaj objektoj en la baseno de Liaohe-rivero en nordorienta Ĉinio, oni frugis la historion de la ĉina civilizacio je mil jaroj.

HOMA VIVO ANTAŬ KVINMIL JAROJ

Oriente de la urbo Chifeng, Interna Mongolio, imponas monto, sur kiu pimpas ruĝa granito. La lokanoj nomas ĝin Ruĝa Monto. En 1935 ĉinaj arkeologoj eltrovis tie kulturajn restaĵojn de la neolitiko. Post esploro oni konstatis, ke ili aĝas kvinmil-sesmil jarojn. Do, arkeologoj nomis ilin Kulturo de Ruĝa Monto laŭ la nomo de la loko. Laŭdire, dum la neolitiko la loko kun densa arbaro kaj prosperaj herboj estis bona vivejo de prahomoj.

La eltrovitaj arkeologiaj materialoj atestis, ke la tieaj prahomoj jam loĝis en fiksaĵoj duone surtere kaj duone subtere en malsamaj grandecoj kaj en formo de kubo. La laboriloj elfositaj el la ruino de la domoj montras, ke la tieaj prahomoj vivis ĉefe de agrokulturo kaj sin okupis ankaŭ pri brutobredado, fiŝkaptado kaj ĉasado.

Ili uzis ŝtonajn ilojn tajlitajn, poluritajn kaj

fajlitajn. La lastaj plejparte estis delikataj, akraj kaj pintaj kaj ofte servis kiel klingo kaj sagpinto.

Ili estis lertaj en farado de fajencaĵoj. Per fajnigo de la materialo ili produktis grandan kvanton da diversformaj koloraj fajencaĵoj. Jen kruĉo en formo de birdo kun rondaj okuloj, levita kapo, larĝe malfermita beko servanta kiel verŝilo, mallonga vosto kun sep truetoj kaj granda ventro kun paro da teniloj.

Dum pli ol 60 jaroj de la studo de la Kulturo de Ruĝa Monto, arkeologoj senĉese eltrovis novajn spurojn de tribo kun historio de pli ol 1.5

mil jaroj en multaj lokoj de la okcidenta baseno de Liaohe-rivero. En la lastaj jaroj la Kulturo de Ruĝa Monto denove faris sensation per gravaj novaj arkeologiaj eltrovoj.


MIRINDA ELTROVO EN MISTERA MONTVALO

Laŭ noto de antikva libro, en printempo prahomoj

okazigis grandiozan renkontiĝon antaŭ templo. Gejunuloj kunvenis tie por kulti diojn per gajaj kantoj kaj dancoj.

En 1980 arkeologoj malkovris en montvalo okcidente de Liaohe-rivero altarojn kun diinaj statuoj nudaj. La tieaj prahomoj rigardis la teron kiel patrinon kaj faris diinajn statuojn kiel simbolon de la Tero Patrino por kulto kaj preĝo pri riĉa rikolto.

Samtempe, arkeologoj malkovris ankaŭ grandiozan diinan templon, ĉe kies ruino ili elterigis



Jada drako elterigita en la Ruĝa Monto



La ĝardeno “Ruĝa Monto”

ses argilajn diinajn statuojn difektitajn, inter kiuj estis figuroj junaj kaj mezaĝaj, plejparte sidantaj kun kruroj interkruciĝantaj kaj brakoj etendiĝantaj aŭ kurbiĝantaj. La tieaj prahomoj kultis kiel prapatrinojn la diinajn statuojn en malsamaj grandecoj. Tamen tio ne signifas, ke tiam ankoraŭ estis la matriarka socio. En plej multaj tomboj tie eltrovitaj dormas viroj, kun objektoj pli karaj ol tiuj en aliaj tomboj. Tio montras, ke en la lasta periodo de la Kulturo de Ruĝa Monto antaŭ 5 mil — 5.5 mil jaroj la tieaj prahomoj jam eniris en la patriarkan socion.

Laŭ la malkovritaj diina templo, altaroj kaj tomboj oni konstatis, ke la tieaj prahomoj jam havis siajn proprajn ceremoniojn funebran kaj kultan. Tio montras, ke ili kreis kulturojn materialan kaj spiritan. En la ruino oni eltrovis ankaŭ totemon kun figuroj de drako, cervo kaj birdo, kiuj estis enkorpiĝintoj de multaj aliaj animaloj. Oni povas diri, ke ĝi evoluis el la totemoj de diversaj triboj. La drako, tipe dia figuro, estas simbolo de la antikva ĉina kulturo. Laŭ la tradicia historiografio la baseno de la Flava Rivero estas lulilo de la antikva ĉina kulturo kaj la Centra Ebenaĵo — lulilo de la ĉina civilizacio. La eltrovo de drako ĉe la ruino de la Kulturo de Ruĝa Monto montras, ke la ĉina civilizita histo-

rio komenciĝis ne antaŭ kvarmil jaroj, sed antaŭ kvinmil jaroj, kaj krom la baseno de la Flava Rivero, ankaŭ tiu de Liaohe-rivero estas lulilo de la ĉina civilizacio.

LA PLEJ FRUA JADA SKULPTAĴO EN ĈINIO

Antaŭ la malkovro de la Kulturo de Ruĝa Monto, ĝiaj jadaĵoj jam estis elterigitaj, nome jadaĵoj de la dinastio Shang. Nur kiam oni malkovris ĉe la ruino de la Kulturo de Ruĝa Monto grandan jasan skulptaĵon kun figuro de drako, oni ĝoje ekkonsciis, ke la ĉina jada skulpturo eble originis de la okcidenta baseno de Liaohe-rivero. Kiel la unua jada drako de Ĉinio, la skulptaĵo forte diferencas de tiu de la dinastio Shang per tio, ke ĝi, en C-formo, sen ungoj kaj skvamoj, havas korpon serpantan, kapon ĉevalan, okulojn viglajn kaj kolharojn longajn.

Oni dividis la jadaĵojn de la Kulturo de Ruĝa Monto en du partojn: unu pri animaloj kaj la alia pri aliaj naturaj estaĵoj, tamen mankas ĉiutagaj vivbezonaĵoj. Tio montras, ke la jadaĵoj eble estis frukto de primitiva religia arto. Krome, ili estis unikaj kunentombigaĵoj de la tieaj prahomoj. Laŭ tio arkeologoj konjektis, ke la tieaj prahomoj prenis jadaĵojn kiel sian spiritan apogon. ■

Li ne bedaŭras

EN Ĉinio, kiam iu malsanas, oni ofte konsilas al li konsulti veteranan ĉin-medicinan kuraciston, ĉar en iliaj okuloj veteranaj ĉin-medicinaj kuracistoj estas ne nur spertaj, sed ankaŭ altnivelaj en kuracado. Tamen kuracisto Wang Shoudong, kvankam iom pli-ol-30-jara, estas sperta en kuracado de reŭmatismo. Li ĝuas reputacion en la distrikto, kie li loĝas. Oni ofte proponas al reŭmatismuloj: "Konsultu d-ro Wang!" Lia famo pli kaj pli grandiĝas kaj ofte direktas sin al li malsanuloj de tre malproksime. En la pasintaj jaroj li resanigis pli ol 10 000 reŭmatismulojn per la de li inventitaj medikamentoj.

Reŭmastismo estas ofta malsano. 90% de la malsanuloj havas 30-50 jarojn kaj 10% el ili perdis laborkapablon pli malpli. La malsano grave malhelpas al reŭmatismuloj en la vivo kaj eĉ kaŭzas al iuj el ili dumvivan kriplecon.

S-ro Wang Shoudong devenis de la familio de ĉin-medicina kuracisto. Li decidis solvi tiun ĉi problemon. En la longatempa klinika praktiko li trovis, ke oni suferas de reŭmatismo ĉefe pro malsufiĉeco da vitala energio, atako de malvarmo, vento, malsekeco kaj aliaj patogenaj faktoroj, ŝtopado de *ĝinglŭo*-vojo kaj malglata cirkulo de sango. La simptomoj de reŭmatismo estas doloreto kaj formikado en membroj kaj artikoj. Reŭmatoida malsano kaŭziĝas de longatempa turmentado de varmaj patogenaj faktoroj aŭ malvarma reŭmatismo. La malsanuloj suferas de ŝvelado kaj doloreto de artikoj. Analizante la patologiajn faktorojn, li kolektis popolajn receptojn. El la centoj da receptoj li elektis la plej bonajn kaj, farante studadon surbaze de la moderna farmakolo-



Wang Shoudong palpanta pulson al malsanulo

gio, li persone provis por koni, ĉu la recepto havas malutilan efikon aŭ ne. Li provis drogherbojn centfoje kaj toksiĝis pli ol dek fojojn. Foje li svenis de medikamenta toksiĝo kaj konvulsiis unu horon. Li estis liberigita de la danĝero post urĝa savado en hospitalo. Ĉe la lito lia edzino kun larmoj en la okuloj admonis, ke li ne plu risku sian vivon. Tamen li respondis: "Por plej efika recepto mi nepre devas persone provi." Por trankviligi sian edzinon pri tio, Wang ĉiam dekoktis drogherbojn post ŝia endormiĝo. Kvankam lia sano estis difektita de medikamentoj, tamen li ne cedis. Post centfoja provado li finfine trovis recepton kun neniu malbona efiko.



Zeng Ming estis junulo bela kaj forta. Tamen li estis forte turmentata de reŭmatoida malsano. Konstanta kuracado ne alportis al li efikan rezulton. La malsano graviĝis tagon post tago kaj li jam ne povis mem aranĝi sian vivon. La longatempa malsano malĝojigis lin kaj en li naskiĝis eĉ ideo sin mortigi. Kiam li legis artikolon pri doktoro Wang, li veturis al la reŭmatisma instituto en

Qingfeng-gubernio de Henan-provinco, kie Wang laboris. Li prenis medikamenton laŭ preskribo de la kuracisto kaj post unu seanco la doloro mildiĝis. Post du seancoj li povis supren iri laŭ ŝtuparo, manportante kvin kg da pezaĵo. Post tri seancoj li tute resaniĝis. Unu jaron poste, li refoje venis al Wang, akompanate de la edzino, speciale por danki lin.

Sur la tablo de Wang ĉiam vidiĝas multe da leteroj el diversaj lokoj de Ĉinio. En la leteroj la pacientoj esprimas sian grandan dankon al d-ro Wang, kiu resanigis ilin. Ili dankis Wang ankaŭ pro tio, ke li donis al ili alian helpon dum la kuracado. Iu malsanulo veturis al li por kuraco, sed survoje li perdis sian monujon, Wang do senpage kuracis lin kaj donacis al li medikamentojn sufiĉajn por tri seancoj kaj monon por lia hejmenreveno.

Wang Shoudong jam sukcese faris la pilolon Pifensan. Por servi al pli multe da pacientoj li penadas senlace. Nun li jam inventis pli da specoj de medikamentoj. La tiea farmacia fabriko produktas grandkvante tiajn medikamentojn. ■

Pudong



La disvolva regiono Pudong de Ŝanhajo situas ĉe la buŝo de Yangzi-rivero kaj rigardas al la urbodistrikto de Ŝanhajo trans la rivero Huangpu.

Por akceli la ekonomian disvolviĝon en la baseno de Yangzi-rivero, la ĉina registaro faris aprile de 1990 la strategian decidon "malfermi pliajn urbojn laŭ Yangzi-rivero kun Pudong kiel avano".

Dum tiuj jaroj en Pudong okazis granda ŝanĝiĝo. Kiel grava altteknologia industria bazo de Ĉinio, Pudong ludas pli kaj pli gravan rolon en importado de eksterlanda kapitalo, interŝanĝo de talentuloj kaj komunikado de informoj.

La poŝtmarko-serio el ses poŝtmarkoj kaj la miniatura filatelaĵo estis emisiitaj en 1996 de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio.



Lago ĉe
Yinchuan

de PIERRE
BERLOT
(Francio)



Fagaro en Olet

de ANA MARIA
MOLERA
(Hispanio)

ISSN 0032-4361



9 770032 436009



世界语《中国报道》一九九八年第六期

(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11-1339/G2